# NORDHUNGARIA INFORMO

***Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo Miskolc***

Julio – Augusto - Septembro 2011-a

6a jarkolekto nro 71-73

# Enhavo


2011 estas la Internacia Jaro de Volonteco, kaj en Hungarujo ankaŭ la Jaro de la Familioj kaj de la Amo ... 3
Misiistoj de la Amo ... 4
Demandoj kaj respondoj de Patrino Tereza ... 5
Epizodoj de la muzika vivo de la malnova Miŝkolco ... 6
La bonefika pomo ... 10
Pripensendo ... 11
Kredkonfeso ... 11
Pensoj pri la antaŭ 120 jaroj naskiĝinta D-ro Aleksandro Karácsony ... 11
Kulturaj ĉefurboj de Eŭropo, 2011 ... 12
Kulturaj ĉefurboj de Eŭropo, 2011 ... 13
2011 estas Jaro ankaŭ de la Kemio ... 14
Pri Diferencialaj Ekvacioj ... 15
Esperantista heredaĵo ... 16
Antaŭ 120 jaroj naskiĝis d-ro Kálmán Kalocsay! ... 17
INVITO por OMAĜo al d-ro KÁLMÁN KALOCSAY ... 17
Ankaŭ en la ĉeha urbo Svitavy troviĝas Esperanto-Muzeo ... 19
Jan Werich - Humuro ... 19
Citaĵoj de Jan Werich ... 19
Funebro ... 27
Mortis granda Eŭropano ... 27
Societo de Tokajmontosubaj Kreantoj – Interreta Societo de Hungaraj ... 28
Ŝercoj ... 28
Hungara venko en Jordano ... 29
Speciala Fako en la Universitato de urbo Szeged ... 30
„Antaŭen” 90-jaras ... 30
Vivovojo ... 30
KIEL MI FARIĜIS E-ISTO? ... 31
En 2011, Nepalo estis loko de la Azia Esperanto-Kongreso ... 32
Karstaj Tagoj enTriesto – Italio ... 33
Rezultoj de Belarta Konkurso de UEA 2011 ... 34
REZOLUCIO DE LA 96-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO ... 36
LA KOPENHAGA UK FERMITA, HANOJO KAJ REJKJAVIKO ATENDAS ... 37
Gratulo ... 38

## 2011 estas la Internacia Jaro de Volonteco, kaj en Hungarujo ankaŭ la Jaro de la Familioj kaj de la Amo

La memvola laboro farite por la komunumo, aŭ por la bezonantoj ne estas unuflanka afero: de la al aliuloj donita helpo ankaŭ ni evoluas kaj riĉiĝas en sentoj, ni povas akiri amikojn kaj novajn daŭrajn interrilatojn. Al nia ĉiutaga vivo ni ĉiam bezonas volontulojn, kiuj helpas senpage. Laŭ mia opinio ĉi tio estos ĉi tiel ĉiam. Ni povas konsenti multspecemaniere al bonigo de la mondo, - kvankam ni ne povas ŝanĝi tion

La Eŭropa Komitato komencis funkciigi la programon „Eŭropa Jaro de volonteco-2011" kun la suba slogano:"Estu volontulo! Faru por la ŝanĝo!"

En la Eŭropa memvola eervo, sed ankaŭ ekstere de tiu, multmiloj da homoj faras memvolan laboron en ĉiuj teritorioj de la socia, ekonomia kaj kultura vivo. La Eŭropa Komitato kunlaboras strikte kun la Eŭropa Parlamento, kiu enhavas la memvolajn organizojn kun la membroŝtatoj, kun komitato de regionoj, kun la eŭropa ekonomia kaj sociala komitato, kun la eŭropa konsilantaro kaj kun volontuloj de la Unuiĝintaj Nacioj.

/ http://www.harmonet.hu/karrier/57555-2011-az-onkentesseg-eve-lesz-europaban.html&harmo=921382/ En nia Esperanto-lingvon disvastiga movado ekzistas volonteco. En Centra Oficejo/CO/ de la Universala Esperanto Asocio/UEA/ Roterdamo, Nederlando/ la multnombraj kulturajn agojn farantoj memvole senpage faras sian laboron, helpante laboron de UEA. Nia retrevuo en la unua numero de 2011 raportis pri helpo al la brazila infanhejmo, kies laboron helpas kiel volontulon la geesperantistoj de la mondo. Ĉi tiu retrevuo, la Nordhungaria informo/NHI/ funkcias memvole, senprofite: aŭtoroj de la artikoloj, redaktoroj, revizoroj senpage, memvole faras tiun ĉi laboron. Ĉi tio estas memvola kultúra misio. Sed vidu nun laboron de la de socio rekonata fama organizo, Fratinoj de Patrino Tereza, kiu organizo havas aktivulojn ankaŭ en Miskolc.

# Misiistoj de la Amo



Patrino Tereza laŭ la Vikipedio

**Fratinoj de Patrino Tereza**

Vivdestino de tiu komunumo estas servo de la malriĉuloj.
Ordenon de Misiistoj de la Amo Agnes Bojaxin Loretto, ordena fratino /Patrino Tereza/ fondis, kiun la Sankta Seĝo aprobis la 7-an de oktobro 1950. La centro de la Ordeno estas en Kalkato /Hindio/. Celo de la Ordeno estas laŭ 4. punkto de la sankta promeso servo de la plej malriĉuloj /korpaj kaj animaj malriĉuloj, , malsatantoj, soifantoj, senvestaĵaj kaj senhejmaj homoj, malsanuloj: lepraj kaj pasiaj malsanuloj, forlasitaj, elpuŝigitaj, amomankon havantoj kaj kiujn minacas danĝeroj de la aborto kaj eŭtanazio, ktp./ Ili ekzercas korpajn kaj animajn farojn de la kompatemo por mildigi helpe de la Sankta Maria soifon pri amo de Jesuo, kiun sentas pri la animoj. Slogano de la Ordeno estas:"Ni faras por Jesuo."Adeptoj de Patrino Tereza kaj tiuj, kiuj turnas sin laŭ la kristana kredo al la helpon petantoj, okupiĝas ofereme kun la malsanuloj, suferantoj, plej malriĉuloj. Ĉi tiu oferemo neniam povas manki el siaj vivoj.
La unuaj fratinoj ekloĝis en Hungario en urbo Érd la 16-an de junio 1989 en iu malplena paroĥejo. Ili iris potage al Budapeŝto kaj komencis viziti la familiojn, forlasitajn homojn laŭ la de paroĥo ricevitaj adresoj. Poste komencis funkcii la vestaĵdeponejo en la budapeŝta 9. distrikto en strato Bokréta, kie komenciĝs la disdonado de la vestaĵoj. La kolektintajn vestaĵojn oni donis al la bezonantoj. En 1990. en la 8. distrikto en strato Tömő la kuirejo kaj manĝejo /por 100 personoj/ konstruiĝis, kie oni komencis disdoni la tagmanĝojn potage por 250-300 personoj. Poste agado de la hungaria ordeno disiĝis Oni malfermis en Érd patrinhejmon, kie oni donas provizoran kvartiron por senhejmaj patrinoj kaj iliaj infanoj. Tutmonde ĉ. 5000 fratinoj laboras ĉ. en 650 domoj. En Miskolc, la fratinoj faras helplaboron de la plej malriĉa popoltavolo, la ciganaj familioj. Ĉi tie Ĉi tio estas ilia misio.
Kanona jura statuso de la Ordeno estas: monaĥina institucio, kiu havas papan juron. La komunumo estas jura persono. Internacia centro de la komunumo estas: Superior General Sr.M.Nirmala MC, Adreso: 54/A A.J.C. Bose Road; Calcutta 700016 WB. Hindio.Telefono: 0091+(33) 24-27-15.
Hungaria centro de la komunumo estas: Battilana Giuliana SR.M. Letizia MC Estra fratino; Adreso: 1083. Budapeŝto, nr. 1 str Ötödik; Telefono: 46/379-061
http://uj.katolikus.hu/rendek.php?h=40

## Demandoj kaj respondoj de Patrino Tereza

Kiu estas la plej bela tago? - la hodiaŭa
Kio estas la plej granda malhelpo? - la timo
Kio estas la plej facila? - erari
Kio estas la radiko de la malbonaj aferoj? - la egoismo
Kio estas la plej bela amuzo? - la laboro
Kio estas la plej danĝera malvenko? - manko de kuraĝo
Kiuj estas la plej bonaj instruistoj? - la infanoj
Kio estas la plej necesa neceseco? - por donaci min mem
Kio feliĉigas plej tute? - Por esti utila por alia homo
Kio estas la plej danĝera eraro? - La melankolio
Kio estas la plej vulgara sento? - La venĝo kaj malamo
Kio estas la plej bela donaco? - La kompreno kaj kunsento
Kio estas la necesa? - la hejmo, la aparteno al io ajn
Kio estas la agrabla sento? - la interna paco
Kio estas la plej bona solvo? - la optimismo
Kio estas la plej granda kontenteco? - la farita devo
Kio estas la plej granda forto en mondo? - la kredo
Kiuj estas la plej gravaj homoj? - la gepatroj
Kio estas la plej bela afero en mondo? - L A A M O

La Hungara Katolika Episkopa Konferenco proklamis Jaron de la Familio de 26 de decembro 2010 / festo de Sankta Familio/ ĝis 30 de decembro 2011/ festo de Sankta Familio/. Celo de la tematika jaro estas prezentado de valoraĵoj de la familio – bazo de ĉiuj komunumoj – kaj fortigo de institucio de la familio.

Kio estas ankoraŭ grava en nia vivo? Ankaŭ laŭ mia opinio la amo estas la plej grava.

(tekston de s-rino László Pásztor esperantigis László Pásztor)

# Epizodoj de la muzika vivo de la malnova Miŝkolco



Nacia teatro en Miskolc (Wikipedio)

Miskolc konstruiĝis ĉe renkonto de la ebeno kaj montaro laŭ la valo de rivereto Szinva. Ĝia impona evoluo komenciĝis en malfrua etapo de la mezepoko. Ĝi gajnis urban rangon en 1365. Dum la 19. jarcento - de la jam pli frue prosperita vinkulturo, muelaj,- kaj gildaindustrio kaj konkurante kun Kassa / nun Koŝice en Slovakio / iĝis centro de metio kaj komerco de la regiono. Dum la jarcentŝanĝo en la cis tibiska Hungario Miskolc estis la plej signifa komerca urbo. Relative pli frue aperis ankaŭ la peza industrio: post la 18. jarcentaj iniciadoj en la dua duono de la 19. jarcento sekviĝis la unua peza industria ekprospero.



Teatro en Kassa/Koŝice (Vikipedio)

El situo de Miskolc sekviĝas, ke iĝis komisuro de kulturoj, kiu havis heterogenan multkolorecon, kiel ĝi karakterizis la komercajn centrojn. Al ĝia tradicia fizionomio apartenas ankaŭ ĝia kapacito. Ĝi kiel rezidejo de departemento gastigis de jaro 1800 la teatran trupon de Transilvanio kaj donis hejmon en Peŝto al la por feliĉigi ne kapablaj hungaraj geaktoroj. Post pli ol unu jarcento jam ĉe pli malbonaj historiaj cirkonstancoj ĝi povis akcepti la trupon de Temesvár /nuna Timisoara en Rumanio/ - sed estas fakto, ke la pro kontrakto de Trianon en sia hejmo la funkciado de la trupo estis neebla, kiu trupo alvenis multe da rekvizitoj /21 vagonoj/ , kiuj estis en Miskolc neniam viditaj luksaj rekvizitaj. De funkciado de trupo de Temesvár ekirigis duan prosperan epokon de operludo de la urbo. /tiu epoko estis nur mallonga./ Ĉi tiu estis agordigite kun tiu pligrandiĝinta funkcio, kiun Miskolc faris de la 1920-aj jaroj, kiel iu kultura „limfortikaĵo" de la stumpigita lando. Konstanta oferemo de iu setlejo pri la spiritaj havaĵoj estas aprecenda faktoro / kaj ĉefe ŝajneblas al aprecenda, se ĝi sekvas aferon de siajn kritikajn minutojn vivanta hungara teatro kaj operarto. Se ĉiuj ĉi tiuj

pruvas bonan praktikan senson kaj ne bagatelan antaŭvidon. Efike de tio ĉi en Miskolc sekviĝis longdistanca ekprospero de arta vivo de la urbo.
La urbo iĝis kultura centro / pli frue ankaŭ lande ĝi iĝis signifa centro, efike de ĝiaj larĝaj eblecoj ĝi iĝis internacie grava festivalurbo / efike de ĝia teatro: Ĝia hungarlingva teatra arto kaj operludo igis kultura centro. Pri la 19. jarcentan hungaran kulturon fortiganta emanco de ĉi tiuj tradicioj, sed pli ol simbola, ke tiutempe en la urbo famaj muzikistoj delonge restadis, kies karieroj ia maniere ligiĝis kun la teatra vivo. El inter muzikistoj Béni Egressy / 1814-1851 / pasigis siajn studentjarojn en Miskolc, kiu cetere naskiĝis en Sajókazinc. Ankaŭ li, akceptante ekzemplon de lia fama pli aĝa frato, iĝis aktoro, havis larĝan krean agadon, kies ĉiuj formoj elformiĝis en teatra tereno. Sama estis Karl Thern / 1817-1886 /, kiu naskiĝis en Igló /nuna Spiská Nova Ves en Slovakio/ kaj originala germandevena. Li fondis studentorkestron en Miskolc en unu duono de la 1830-a jardeko, donante al siaj muzikistkunuloj siajn popularajn komponaĵojn. Sama estis ankaŭ Adolfo Ellenbogen / 1825-1880 /, kiu same estis membro de la orkestro de Thern, pli malfrue atingis al Peŝto, al la Nacia Teatro kaj iĝis unu el la plej popolara hejma,enlanda danckomponisto de la dua duono de la 19. jarcento. Por ambaŭ tri estis determinitaj de la junaĝaj travivaĵoj de Miskolc.
Sed ekprospero de la kulturo daŭris delonge kaj Miskolc vivis en kultura vidpunkto en ombro de la najbara departementa eklezia centro kaj lernejurbo Eger. Post la turka regado cent jarojn konsiderinte, kultura gravo de Eger povas ŝajni pli elita, sed Miskolc, ĉefe de sia teatro laŭgrade superis urbon Eger el multspecaj vidpunktoj. De komenca de la 20. jarcento ankaŭ Miskolc ĉiam plie lernejurbo estis. Tiel ŝajnas, ke muzikvivo de Miskolc ligiĝis al Eger,al kio aludas tiu grava okazintaĵo, dume la 21-an de julio 1757 je estimo de ĉefprinco Ferdinando – kiu restadis en la urbo – oni aranĝis festas Tedeumon, dum tio muzikis muzikistoj de Eger. Laŭ tio tiel ŝajne Miskolc ne haveblis artajn profesiajn muzikistoj tiutempe. Ĉi tio estis konsekvenco de la kamparurbeta rango de la urbo. Laŭ esploro de Kornél Bárdos ni scias, ke en centro de muzikvivo de la liberaj reĝaj urboj estis la en gildoj vivantaj instruistaj muzikistoj: urbaj trumpetistoj, aŭ turmuzikistoj. Tiuj nur malofte muzikis en la kampareturboj, kaj en Miskolc ni ne scias pri tiuj. La malsufiĉaj eblaĵoj apenaŭ estis idealaj por disvolviĝi karieroj de la junaj talentoj. Ĉi tion povas konkretigi ekiro de Ede Reményi /1828-1898 /, kiu naskiĝis en Miskolc. El lia vidpunkto bona decido estis poste, ke la familio transloĝiĝis al Eger, kie la juna violonisto povis lerni ĉe ĥorestro de la katedralo de Eger. En Miskolc li ne provintus trovi same instruistan muzikistinstruiston. Ankaŭ tio estas karaktera, ke en la 1878/1879. jara sezono Miskolc aliĝis al la landa teatra sangocirkulado, dume la soldatorkestro de Eger muzikis en teatro de Miskolc, kio vigligis kulturan vivon de la urbo. Malfrua manifestado de la malnova ekzerco povis esti, ke en 1901 oni petis ĥorestron de katedralo de Eger, Erneston Lányi /1861-1923 por gvidi la novan muziklernejon de Miskolc. / Tiel ŝajnas, ke ĉi tio estis la lasta vidaĵa kazo de „muzikistimporto” de Eger en historio de departementrezidejo de Borsod.
En la 19.jarcento jam ankaŭ famaj muzikistoj ekloĝis en Miskolc,kelkfoje ankaŭ definitive. Kiel ilia heroldo ni povas rigardi Johanon Lavotta /1764-1820 /, kiu restadis en la urbo inter 1797-1799 / pri lia tiama agado bedaŭrinde ni ne scias multe/ Antonio Fáy, fortepianisto /1805-1872 / de Emőd delonge, ĝis1869 loĝis en Miskolc. Gustavo Szénfy /1819-1875 / de Nyiregyháza estis unu el la lande popularaj kantokomponistoj de la malfrua reformepoko, kiu muzikigis poemojn de Aleksandro Petőfi. Dum la 50-aj jaroj li okupiĝis pri teoriaj demandoj de la hungara muziko kaj komencis kolekti popolkantojn. Sed lia laboraĵo fiaskiĝis, ne trovis eldoniston – reiris al Nyiregyháza trompiĝante. De 1860 ĝismorte li funkciis en Miskolc, ĉefe kiel muzikinstruisto. Spite de tio, ke li estis elstara 19. jarcenta muzikpedagogo inter aliaj, ankaŭ la posteularo vere traktis maljuste. Oni forgesis lin dum mallonga tempo, kion pruvas, ke la 20. jarcentaj monografioj de Miskolc – en unua triono de la 20. jarcento – jam ne mencias lian agadon de Miskolc.

Fine de la 19.jarcento post ekskluziva funkcio de la privataj instruistoj oni pretendis ĉe institutoj por instrui la muzikon, kaj imponan vigliĝon de la muzikvivo: inter aliaj por fondi entuziasmajn kantoĥorojn, orkestrojn, publikan societon kaj regulajn simfoniajn koncertojn. Ĉi tiu evolua impeto estis pli rapida, ol la landa averaĝo kaj ankaŭ la ekonomia evoluo superis evoluon de aliaj urboj. Dum la jarcentŝanĝo kaj dum la unuaj jardekoj unua vidaĵa ekprospero de muzikkulturo de Miskolc okazis. La rapide pligrandiĝanta urbo klopodis krei memstaran muzikan fizionomion sojle moderniĝo, dank'al sia muziklernejo, kiu de sia fondo funkciis elstare kaj povis certigi daŭre la fakan fonon. La urbo rekonis la eblecojn, kiuj estis donitaj el ĝia situo: la urbo lanĉis tiun penson, ke la urbo iĝu kultura centro de la nordhungariaj teritorioj tempe de la lastaj pacaj jaroj. Estis karakterize, ke tiu regiono volis defendi siajn interesojn kaj volis estigi muzikasocion de Altlando /en 1913 ĝiaj membroj estis Kassa, Eperjes, Sátoraljaújhely, Eger kaj Miskolc./ Laŭ tiama lanĉado oni fondis en 1908 la Landan Publikkulturan Konsilantaron.
En la urbo estis grandsignifa muzika aranĝaĵo: 7. landa kantoĥorfesto, kiun partoprenis 47 ensembloj. En 1874 oni fondis la kantoĥorsocieton de Miskolc, kiu jam de la fondo honorajn sukcesojn atingis kaj akiris bonan prestiĝon. Ĉi tiu urba kantoĥoro estas la plej malnova, havante pro la nivela laborprodukto socian honoron. /tiun ĉiam direktis la ĉiama muziklerneja direktoro./ Pro tio ni povas paroli tiutempe pri vera kantoĥorfonda ondo. Ĉi tiel sume 18 kantoĥoroj funkciis en Miskolc, kio ne estas malmulte en tiu urbo, kiu havas 60000 loĝantojn! Apud agado de la muziklernejo al Ernesto Lányi kroĉiĝis unua prezentanta spektaklo de moderna koncertvivo de Miskolc, kiu preskaŭ donis ĉefurban rangon al la ĉi tiea koncertpraktiko. Nome oni prezentis Rekviemon de Mozart en aprilo de 1904, ekskluzive nur kun lokaj kunlaborantoj / inkluzive intruistaron de la muziklernejo kaj ties gelernantojn, orkestron de la 65. infanteria regimento, simfonikan orkestron de la Ferfabriko, la kantoĥorsocieton de Miskolc, amatorojn, ktp./ Pri ekzistoj de orkestroj – kiuj sendependaj de teatro kaj soldataro – ni havas indikojn de fino de la 19. jarcento. De 1886 ĝis 1892 faris ekleziomuzikan taskaron iu ekumena katolika templa ensemblo, gvidite de Vencel Hradik, al kiu apartenis ankaŭ miksa kantoĥoro. Oni estigis publikkulturan kaj muzean societon de Borsod-Miskolc, kiu helpis aferon de la urba orkestro: helpe de la societo amatora arĉista orkestro fondiĝis en 1904. La societo protektis la kulturon, faris popolklerigadon, inspiris literaturan vivon de la regiono, organizis migrajn ekspoziciojn, faris multflankan muzikan agadon, fondis bibliotekojn kaj muzeojn. Agado de la societo dum kelkaj jaroj ĉesis, sed de 1909 jam denove havis gravan rolon en muzikvivo de la urbo. Ernesto Lányi iris en 1907 al Szabadka /nuna Subotica en Serbio/, ĉar gvidis la tiean muziklernejon. Ĝia kaŭzo estis, ke mankis en Miskolc la vivkapabla orkestro. Plaĉis al li pli bone la eblecoj de Sud-Hungario, kie povis pensi laŭ longdistancaj perspektivoj. En Miskolc, la prezentado de Rekviemo de Mozart ne kontentigis liajn muzikajn pretendojn. Sed en Szabadka jam fine de 1907 daŭre funkcianta simfonia orkestro estiĝis, kiun Ernesto Lányi direktis. En Miskolc sama ensemblo fondiĝis nur en la 1920-aj jaroj. Sed pli frue la jam menciita arĉistorkestro kun trumpistoj de la 65. infanterio –regimento, aŭ kun simfonia orkestro de la Ferfabriko kunlaborante jam plurfoje atentindajn artajn sukcesojn atingis. La Simfonia Orkestro de la Ferfabriko estis la plej bona kaj plej malnova laborista orkestro de la lando. Ĝi ekzistis oficiale de 1893. Pli malfrue la societo de la arĉistoj ĉefe konsistis el ferfabrikaj muzikistoj. Specialan kazon de la ferfabrikaj kulturaj organizadoj reprezentis la en 1911. estigita Ferfabrika Ĉambromuzika Societo de Miskolc-Diósgyőr, kiu dum jaroj faris muzikan memklerigadon pere de prelegoj 42-oble.
Menciita orkestro de Publikklerigada Societo aranĝis komponaĵojn por la publiko de Miskolc: H-moll simfonio de Schubert, kvar simfonioj de Beethoven, popularaj teatraĵoj de Bizet, Grieg, Goldmark, sed ankaŭ ne regulan operludon: „Honoro de kamparano" verkite de Mascagni en la ferfabriko en 1911. okaze de 25. datreveno de la Oficira Kantoĥorsocieto.

Siajn produkciojn ili prezentis ankaŭ en Kassa, kaj Eperjes/ nuna Preŝov en Slovakio./ En la 1911/1912.jara sezono oni eksonigis publike 52 komponaĵojn de 15 hungaraj kaj 25 eksterlandaj komponistoj. La dirigento estis Julio Szent-Gály, tiama muziklerneja direktoro. Ĉi tiun evoluon bedaŭrinde rompis laŭleĝe unue la mondmilito kaj la postaj tragikaj ŝtormoj. Vidaĵan vigliĝon portis la 1920-aj jaroj en kultura vivo de Miskolc. Je lanĉado de Francisko Koller, muziklerneja direktoro fondiĝis la Filharmonia Societo de Miskolc en 1921.Samjare komencis funkcii la menciita ensemblo de Temesvár, direktite de Géza Sebestyén: en Miskolc dum la unuaj tri monatoj 25 operludojn kaj dum du jaroj 100 operludojn ili prezentis! / tiutempe Miskolc estis la sola regiona urbo, kie la enirbiletoj elĉerpiĝis jam en antaŭaĉeto!/Meze de la jardeko okazis interna rekonstruado de la teatro, atentante dezirojn de la societo. La modernigitan konstruaĵon oni inaŭguris komence de 1926. Post monatoj definitiva solvo estiĝis – ankaŭ lande estis ekzemplodona -, ĉar la plej elementaj zorgoj de la muziklernejo, kiu suferis senĉese mankon de lokoj, solviĝis.Nome la impona Muzikpalaco konstruiĝis, kiun Julio Wälder kreis. Pli malfrue ambaŭ renoviĝintaj institutoj havis gravajn rolojn. en kultura ekprospero de Miskolc dum sekvaj jardekoj de la 20. jarcento, kvankam estis kontraŭdiraj kaj ankaŭ negativaj fenomenoj en arta vivo de la urbo.

## Literaturo

Johano Szendrei: Historio de urbo Miskolc. V./ 1800-1900 /, Miskolc, 1911.
Memorlibro / okaze de 25.jara datreveno de fondo de „Hubay Jenő muziklernejo de Miskolc kaj okaze de festo de inaŭguro de nova palaco de Miskolc. /redaktis Ferenc Kollár, Miskolc,1927.
Miskolc / en monografia serio „Hungaraj urboj"/, redaktis Béla Halmay kaj Andor Leszih, Budapest, 1929.
S-rino Irene Zalán Varga: Elformiĝ kaj evoluo de la publikklerigada kaj muzea societo de Borsod-Miskolc ĝis la unua mondmilito.Jarlibro de Muzeo „Herman Ottó" X./Miskolc, 1971./
Tibor Zádor: Historio kaj rolo de la orkestro de Ferfabriko de Diósgyőr en elformigo de muzika klerigado de laboristoj ĝis la liberiĝo. Jarlibro de muzeo „Herman Ottó" X./Miskolc, 1971.
Nacia Teatro de Miskolc 1823-1973. Redaktis Ferenc Katona, Hungara teatra instituto, Budapest, 1973.
S-rino Gábor Varga: Fondo de la urba orkestro de Miskolc kaj kaj lukto por la ekzistado ĝis 1914. Arkiveja jarlibro de Borsod II. Miskolc, 1979.
Muzikhistorio de Hungario II. 1541-1686. Redaktis Kornél Bárdos, Budapest, 1990, I.ĉapitro: Urba muzikvivo, /Kornél Bárdos.
Tibor Tallián: Ĉefurbo kaj regiono en la hungara operklerigado /2/ Muziko.februaro, 1997.

/ La hungarlingvan tekston de Karlo Sziklavári esperantigis László Pásztor/

# La bonefika pomo


La pomo Idared

La pomo estas la sola frukto, kiun ni povas manĝi kune kun aliaj manĝaĵoj, sen tio, ke fermentus en la organismo. Oni sciis jam tion ĉi dum la antikva epoko, pro tio nomis la pomon kiel reĝino de la fruktoj. Dum epoko de la Romioj oni konis 29 gravajn pomspecojn.

En Hungario oni produktas la pomon sur plej granda teritorio el inter la fruktoj. Ĉi tio estas la situacio en Miskolc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La hungaraj produktistoj elektas tiujn specojn, kiujn povas vendi en Eŭropo en la foiroj. Ĉe ni estas la plej disvastiĝintaj specoj estas) Jonagold /maturiĝas en septembro/ kaj Idared /en oktobro maturiĝas/.

Ĉi tiuj specoj bone estas konserveblaj sen damaĝo ĝis printempo, kiam jam la freŝaj fruktoj aperas en la foiroj. La pomo estas bone livereblaj. Multe da specoj troveblas en la mondo. La pomo enhavas: albuminon, fibrojn, amelon, salon, malatan acidon,, taninon.Ĉefe multe da fosforoj, feroj, kaj natrioj ĝi enhavas. Nia stomako rapide digestas la pomon dum mallonga tempo kaj el ĝi energio formiĝas. La fosforo helpas al tiuj, kiuj faras fizikan laboron, aŭ kiuj estas neŭrasteniaj. Se iu ne manĝis delonge pomon, aŭ ne bona estas funkcio de la stomako, aŭ digesto de la manĝaĵoj malfacile okazas, laŭgrade manĝu pomon, unue nur kelkajn pecojn bone maĉante, ĉar ĉi tiel ĝi miksiĝas bone kun la muko, kio estas tre ege grava. Poste povas manĝi plurajn pomojn, atentante, ke kaĉo iru en la stomakon. Ĉiam antaŭ manĝado unu horo ni manĝu pomon. Ni faru tiel ĉi ankaŭ ĉe manĝo de aliaj fruktoj. Kiun ajn frukton ni povas manĝi kiel ĉefmanĝo. Grandparto de la fruktoj havas kuracan efikon, liberigas la organismon de la damaĝaj materialoj. Inter aliaj la pomo havas purigan kaj kuracan efikon ĉe la subaj malsanoj: nutraĵveneniĝo, enterito, disenterio, intestinfekto, sed ankoraŭ en ankaŭ ĉe gruzo-malsano estas efika.La pomo kuracas la lakson sen konstipo, regulas la intesto funkciadon, purigas la ureterojn kaj la pulmon. Ĝi kuracas la reŭmon, artriton,, ĉar saloj de la pomo solvas la urinŝtonojn. Kvankam la pomo acidhava,tamen lesiva estos la organismo, ja ĝiaj organikaj saloj neŭtrigas acidojn de la malkomponaĵ de la albuminoj. La pomo bone mildigas la bronkiton kaj la superajn spirvojajn malsanojn. Bona estas por scii, ke la dolĉa kaj acida pomoj aliel efikas. Tiuj manĝu dolĉan pomon, kiuj suferas pro konstipo, aŭ anemio kaj pli acidetan pomon tiuj manĝu, kiuj estas tronutritaj, aŭ suferas pro reŭmo. Ambaŭ pomspecoj havas sangopurigan efikon. Tiuj pomoj estas utilaj por tiuj, kiuj suferas pro aterosklerozo, aŭ sia koro funkcias maqlforte, aŭ havas hemoroidon. Ĉe virinoj tiuj pomoj efikas kontraŭ menstruaj plendoj. Tiuj, kiuj faras laboron sidante, devas fari podumonate pomterapion. Tiu signifas tion, ke dum unu tago povas manĝi nur pomon. Nur unuspeca pomo manĝeblas, nome ĉiuj pomspecoj havas diversajn kvantajn acidon. Ne miksu la diversajn pomspecojn!

Ni manĝu tutan pomon. Ni ne ĵetu stumpon de la pomo, ĉar ĝi enhavas valoran jodon. Eblas ĉesigi kun la pomo la vomemon dum graveda stato. Ĉiuj fareblas pomterpion tutjare en intereso de regeneriĝo de la organismo dum 4-5 semajnoj kaj la unua semajno estu la enkonduko.

(tekston de Doktorino Helena Bikszádi esperantigis László Pásztor)

## Pripensendo

Se la piediro estus sana, tiam la poŝtistoj vivus eterne. La baleno naĝas tuttage, manĝas nur fiŝon, trinkas akvon, spite de tio estas dika. La leporeto kuras, saltas kaj estas vegeterana kaj vivas 5 jarojn.
La testudo ne kuras, ne saltas, nenien rapidas kaj vivas 450 jarojn.

(Tekston de Jozefo Gulyás /el urbo Ózd/ esperantigis László Pásztor)

## Kredkonfeso

Stefano Széchenyi, grafo naskiĝis antaŭ 220 jaroj, kiu ankaŭ el inter la „ plej famaj hungaroj" estis elstara persono. Ni rememoris pri lia vivo pasintjare okaze de datreveno de lia morto /8 aprilil860./ Nun ni citas en kelkaj frazoj sian kredkonfeson: Estimu la pasinton por kompreni la nunon laj por labori por la estonto." „Se pri la bagatelaĵoj ni ne estas severaj pri ni mem, tiam nek pri grandaj aferoj povas esti severaj nek volante." „Nia nacio havis tiun eraron, ke aŭ ne fidis j esi mem, aŭ memfidis sin." „El tiuj ŝtonoj, kiuj ruliĝas antaŭ nin, ni povas konstrui ŝtuparon kun iometa lerteco."
Okaze de lia morto en Miskolc la Civilsocieto aranĝis kvar semajnan funebron iniciate de Jozefo Lévay. En jaro 1993 oni inaŭguris publikplacan statuon je lia memoro.

/tekston de s-rino László Pásztor esperantigis László Pásztor./

## Pensoj pri la antaŭ 120 jaroj naskiĝinta D-ro Aleksandro Karácsony

(karaĉonj)

**/1891-1952/ pedagogia, filozofia verkisto**

Liaj verkoj atestadas pri tio, ke li estis ĝisoste unu el la plej famaj edukistoj. Aleksandro Karácsony divenis dum sia pedagogia agado kaj esploro, ke senta, intelekta kaj vola eduko ne ekzistas senpermaniere. La individuo estas aŭtonoma ankaŭ dum la edukado. Sed en la realo la edukado tamen estiĝas, povas estiĝi. Ĝi ne povas okazi aliel, ol en komunumo, se la edukisto kaj edukatoj rilatas unu al la alia, kreas komunumon. Animaj proprecoj de la individuo kaj evoluas helpe de la rilato al la aliaj. La edukatoj bezonigas komunumon. La intelektularo estas portanto de aktuala, valida scienco de la nuno kaj la junularo estas la energia grupo de la komunumo. La pretendo estas la mova forto de la ago.Kiu havas superfluon, tiu povas donaci el ĝi. La servo estas konscia ago. La junularo estas oferema, la infano ne estas malperfekta plenkreskulo, sed perfekta infano elementa rajto de la infano estas la ludado. La infano ĝojas, se imitas sukcese la plenkreskulojn. Ne estas bezonata speciala organizo en la infanludejo. La infano bone ludas en ariĝadanta societo. Ĉi tion rekonante naskiĝis penso de tiu pedagogio, kiu estiĝis sur grupopsikologiaj bazoj.
//Georgo Kontra: Aleksandro Karácsony.Hungaraj pedagogoj-serio. Budapeŝto.1992.
Landa Pedadogia Biblioteko kaj Muzeo, 7. p./ Hunhír.Info - Árpád Gyulai

**Dudich, Endre**

# Kulturaj ĉefurboj de Eŭropo, 2011

## Tallinn, la „Dana urbo”



Tallin (Wikipedio)

### 1. Kuriero al G2, ŝak-mato

Komence de la 1970-aj jaroj mi havis korespond-amikojn esperantistajn dise en la mondo, ekde la brazilia Recife ĝis la taĝikistana Duŝanbe. Estis inter ili ankaŭ viro el la urbo Tallinn, Johano A., laŭprofesie bibliotekisto. Kiam mi eksciis, ke li estas entuziasma amatora ŝakisto, ni komencis ŝakludi – perletere. Tio estis malrapida afero. Aerposta letero – dek tagoj tien, dek tagoj reen. La scivolemaj „zelotoj” nek ĉi-tie, nek tie rapidis konvinkiĝi pri la realeco de la paŝoj. La unua partio daŭris duonjaron, kaj venkis ĝin Johano.

En la jaro 1976 mi partoprenis tre riĉenhavan grupan vojaĝon: Budapeŝto – Leningrado – Tallinn – Rigo – Vilniuso – Moskvo – Budapeŝto. (Mian valizon MALEV, la Hungara Flugkompanio, sendis anstataŭ Leningradon al Orienta Berlino, sed cetere ĉio estis en ordo.)

Alveninte al la ĉefurbo de la Estona Soveta Socialista Respubliko, de la poŝtoficejo situanta apud la hotelo mi sendis telegramon al Johano. Li venis, brakumis min, kontraŭdiron ne tolerante deklaris, ke mi vespermanĝos ĉe ili, kaj vokis taksion. Ekster la urbo en pinarbaro Johano haltigis la taksion, pagis kaj sendis ĝin for. Domon mi ne vidis. Al mia demando li respondis per alia demando: „Ĉu koncernas la ŝoforon, kien mi akompanas vin?” Kelk-minuta marŝo. Familia dometo, afabla dommastrino. Dum la vespermanĝo estis preparata, mi ricevis du ŝak-matojn de Johano, kiu dank'al tio iĝis ĉiam pli gaja. Alvenis du amikoj, kaj mirakle aperis botelo da vodko. Poste ankaŭ la blua-nigra-blanka nacia flago. Noktomeze oni jam kantis la estonan nacian himnon, kiu estis malpermesita, punenda per deportado.

„Mu isamaa, mu õnn ja rõõm, kui kaunis oled sa!” Mia patrujo, mia fiereco kaj ĝojo, kiel bela vi estas!

Cetere la pinarbaro – kiel mi sekvintmatene eksciis – troviĝis sur la fajnsableca marbordo nomita laŭ la rivereto kaj vilaĝeto Pirita. (Ne laŭ la samnoma mineralo, sulfido de fero.) Poste, en 1980, Pirita estis la moderne konstruita scenejo por la akva-sportaj konkursoj de la moskva olimpiko. Nun ĝi estas moda kaj multekosta kvartalo de vilaoj de la ĉefurbo. Ĝi estas fame konata ankaŭ pro tio, ke ĉiuvintre okazas tie konkursoj de naĝado en glacia akvo, nomitaj „Pirita Open”. Ĉi-jare tio okazis la 7-8-an de januaro; partoprenis ankaŭ naĝistoj el Latvio, Litovio kaj Rusio.

### 2. Neverŝajna historio

La grupa urborigardado estis plezura vojaĝo trans la tempo.

Apud vilaĝeto de estonaj fiŝistoj el la 12-a jarcento la danoj konstruis fortikaĵon (Lynndanisse, Tán linn). Prosperis la komerco, kaj la setlejo. Kaj en 1248 la vilaĝo ricevis la rangon de urbo. En 1347 la dana reĝo vendis ĝin al la Teŭtona (Livonia) ordeno de kruckavaliroj. La germana nomo de la gotika Hansa-urbo estis Reval. Sekvis longa vico de konkerantoj: svedoj (kun ili venis la protestantismo) en 1561, la rusoj en 1710, la germanoj en

1939, kaj denove la rusoj en 1944. En 1991 per la „kantanta revolucio” Tallinn iĝis denove ĉefurbo de la sendependa Respubliko Estonio. (Inter 1918 kaj 1939 ĝi jam estis memstara respubliko.)
Estonio iĝis membroŝtato de Eŭropa Unio, kune kun Hungario, en 2004. Ĝi estas ankaŭ membro de NATO.
La Malnova Urbo, zorgeme restaŭrita por la olimpiko de 1980, ekde 1997 estas parto de la monda heredaĵo de UNESKO. Por hungara turisto estas speciala frandaĵo la du- kaj duonjarcent-aĝa apoteko de la hungara familio Bélaváry-Burckhardt. Ĉi-jare Tallinn havas 400 mil loĝantojn kaj estas unu el du kulturaj ĉefurboj de Eŭropo. (La alia estas Turku en Finnlando.) En la planata riĉa programo havas gravan rolon la (tre vivantaj) tradicioj de la folkloraj korusoj, la baroka muziko, la literaturo por infanoj, kaj la kino-arto.
En Tallinn estas bone esti hungaro. Eĉ la maljuna lada standardisto Vanha Tomas (Olda Tomaso) rigardas nin amike desur la turpinto de la urbodomo.

**Dudich, Endre**

## Kulturaj ĉefurboj de Eŭropo, 2011



Blazono de Turku (Vikipedio)

### Turku, la „merkatejo”

En majo 1990 internacia grupo de geologoj studis la spurojn de la lasta glaciepoko en Skandinavio. Ni startis el Oslo. En la suda parto de Norvegio kaj Svedio ni rigardis tra glacikovraĵo poluritan surfacon de granitoj kaj la sedimentoj postlasitaj de la degelinta glacio. Okazis ankaŭ prelegsesio, en Stokholmo, en la Sveda Reĝa Akademio de Sciencoj. Estis unika sperto ke en la vestejo oni ligis katenon tra la maniko de la surtuto kaj fermis ĝin per pendseruro. La gasto ricevis anstataŭ vesteja bileto ŝlosileton.
Poste ni traveturis la Botenan golfon al Finnlando, borde de impona, luksa, tutkomforta pramŝipo de la Viking Line kompanio.
La havenurbo havas eĉ du nomojn. Svede Åbo, finne Turku. (Oni diras, ke ĉi-lasta estas de slava deveno: „turgu, targ” = merkato, merkatejo.) Ĝi estas, post Helsinki, la dua plej granda haveno de Finnlando, kaj la tria plej granda urbo, post Helsinki kaj Tampere (170 mil da loĝantoj).
La tre malnova setlejo en la 13-a jarcento ricevis rangon de urbo. La riveron Aurajoki trapontas naŭ pontoj. Turku iĝis episkopa, poste ĉefepiskopa rezidejo, kun fortikaĵo, gotika katedralo konstruita el ruĝaj brikoj (1300) kaj dominikana monakejo. Dum longa tempo ĝi estis membro de la Hansa ligo. Ĝis 1809 Turku estis neoficiala ĉefurbo de Suomi sub la sveda regado. Kiam (oficiale en 1812) la svedan regadon anstataŭis la rusa, Helsinki iĝis la ĉefurbo de la nova grandprincejo, kaj Turku retiriĝis en la fonon.

En Turku estis fondita la unua universitato de la lando, en 1640. (Ties laŭjura posteulo estas la nuntempa Universitato en Helsinki.) Post la apartiĝo el la Rusa Imperio (1918) estis fondita ankaŭ sved-lingva universitato (Abo Akademi), kaj post du jaroj – nova finnlingva (Turun yliopisto). Ni menciu ke nur 5 % de la loĝantaro de Turku estas denaske svedlingva.
Ekde 1997 Turku havas ĝemelurbon en Hungario: urbo Szeged.
La geologian ekskurson ni finis en Helsinki. La ferman kunvenon de la projekto pri la glaciepoko oni aranĝis en la Geologia esplorcentro (Geologinen Tutkimuskeskus). Sur la prezidenta tablo staris la flagetoj de la partoprenantaj landoj. La finnaj organizantoj metis tien ankaŭ la trikoloran (bluan-nigran-blankan) flagon de Estonio. Tio provokis fortajn emociajn reagojn. La estro de la soveta teamo energie protestis: Estonio ja estis unu el la membro-respublikoj de Sovetunio. Sed vane. (Kvankam laŭforme li pravis.) Fine de la kunveno ni aŭskultis orkestran varianton de du strofoj de la finna nacia himno. Estis nur malmultaj, kiuj komprenis ties sencon. Temas simple pri tio, ke la melodio de la naciaj himnoj de Finnlando kaj Estonio estas la sama, sed la teksto ne.
Kiel konate, unu jaron pli poste, en aŭgusto 1991 Estonio iĝis denove sendependa.

## 2011 estas Jaro ankaŭ de la Kemio



S-ino Marie Sklodowska Curie

La Internacia Organizo de Kemiaj Sciencoj (IUPAC: International Union of Pure and Applied Chemistry) tiel decidis en 2007, ke la jaron 20011. proponis Internacia Jaro de la Kemio. Post unu jaro la Plenumkomitato de UNESCO unuvoĉe akceptis la ĉi tiun decidon, kaj laŭ ilia propono la UN en decembro de 2008 deklaris la jaron 2011 Internacia Jaro de Kemio. La elekton de ĉi jaro ĝi motivis per tio, ke ĉi estos la 100a jardatreveno de disatingo per Nobel-premio, de s-rino Marie Sklodowska Curie, kaj la Fondo de la Internacia Organizo de Kemiaj Sciencoj. Vi povas legi pri vivo de Marie Sklodowska Curie, ĉe:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Maria_Skłodowska-Curie

Barry Friedman

# Pri Diferencialaj Ekvacioj

En matematiko estas kampo nomata “Diferencialaj Ekvacioj”-on. Diferencialaj ekvacioj estas la lingvo en kiu la leĝoj de naturo estas esprimataj. La komprenado de diferencialaj ekvacioj estas fundamenta por la plimulto de scienco kaj inĝenierarto.
Ofte diferencialaj ekvacioj traktas pri funkcioj de unu varianto, speciale pri la funkcio de tempo. Ili esprimas la interrilaton inter varianto kaj ĝia derivîĝo. Kaj derivîĝo estas la momenta rapido de ŝanĝîĝo de unu varianto rilate al alia varianto. Oni povas uzi diferencialajn ekvaciojn por studi ekzemple la forpasîĝon de radioaktivaj substancoj, la Neŭtonan leĝon pri malvarmîĝo, la loĝantaran dinamikon, ktp.

**La Forpasîĝo de Radioaktivaj Substancoj**:
La diferenciala ekvacio pri la forpasîĝo de radioaktivaj substancoj estas :
- dN/dt = (lambdao) N ,

kie “lambdao” estas pozitiva numero kaj estas konstanto, “N” estas la kvanto de la substanco, kaj “t” estas la tempo. Rimarku, ke “dN/dt” estas derivigxo. Ĉi tiu ekvacio diras, ke la rapido de la forpasîĝo estas rekte rilatata al la kvanto de la substanco.

Oni povas rearanĝi ĉi tiun ekvacion por meti la “N”-ojn en la saman flankon de la ekvacio:
- dN/N = (lambdao) dt ,

kaj nun oni povas uzi integralan kalkulon por solvi ĝin. La solvo estas:
N = N0 {exp [ - (lambdao) t ]},
kie N0 estas la kvanto de la substanco je la komenco.

**Jen praktika apliko de ĉi tiu ekvacio:**

Radioaktiva izotopo havas duonîĝan tempon de 16 tagoj. Oni volas havi 30 gramojn de ĝi post 30 tagoj. Kiom da ĉi tiu izotopo oni havu komence?
Por solvi ĉi tion, unue trovu la valoron de lambdao. Oni povas trovi ĉi tion ĉar, pro la difino de duonîĝa tempo, N = N0 /2 post 16 tagoj. T do estas 16 tagoj, N estas 1 gramoj, kaj N0 estas 2 gramoj. Metu ĉi tiujn numerojn en la ekvacion kaj solvu por la valoro de lambdao.
Kiam jam la valoro de lambdao estas konata, oni uzas la ekvacion kun t = 30 tagoj kaj N = 30 gramoj por kalkuli N0–on.
La solvo estas 110 gramoj.
Estas ja evidente, ke sen diferencialaj ekvacioj socio ne povus antaŭeniri kaj krei modernan vivon. La ideoj malantaŭ ili unue ekvidîĝis jam dum la 1630-aj jaroj en Eŭropo. Kaj egale en diferencialaj ekvacioj nuntempa socio havas fortan ilon por daŭrigi ĉi tiun progreson.

bfriedman@chemistry.ohio-state.edu

## Esperantista heredaĵo

Mi informas la legantaron de tiu ĉi retrevuo, ke la esperantistan heredaĵon de sinjoro Barnabás Batta (1929-2009): la eksa prezidanto de la „Ora Duopo Kalocsay-Baghy” Esperanto Klubo en Miŝkolco, entombigita je la 5-an de januaro 2010-a, laŭ deziro de lia familio mi disdonacis al la sekvaj:
1, Reliefon pri d-ro Kolomano Kalocsay, preparitan el argilo, kun libroj, gazetoj, prospektoj, albumoj, oficialaj dokumentoj pri la Kalocsay-memorlokoj de urbo Abaújszántó – ricevis la Kalocsay- Memorĉambro en Abaújszántó.
2, La portreton de la maljuna d-ro Kolomano Kalocsay (gravuraĵo laŭ linoleumo) de ni rekadrigitan mi donacis al la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko (Budapeŝto), ĉar lia verkaro tie troveblas en la Kolektaĵo – Fajszi.
3, Mi donacis similajn dokumentojn ankaŭ al la Hungarlanda Esperanto-Asocio (Budapeŝto).
4, Kelkajn librojn, prospektojn instrucele ricevis la esperantista instruistino: Julianna Vas-Szegedi en urbo Tiszafüred.
5, Same esperantlingvajn prospektojn ricevis la Esperanto lingvon instruanta s-ino Maria Busai kaj la partoprenantoj de la Zamenhofa-festo en Miŝkolco en la jaro 2010.
6, Librojn, kaj oficialajn dokumentojn de la heredaĵo havas ekspozicio-cele la geedzoj Pásztor.
Pri sinjoro Barnabo Batta, ni rememoris okaze de la unujara datreveno de lia entombigo. Sur lian tombon sinjoro László Pásztor plantis unusomerajn florojn, kaj prizorgas piece.
Lia memoro vivas.

S-ino Adri Pásztor

## Antaŭ 120 jaroj naskiĝis d-ro Kálmán Kalocsay!



**D-ro Kálmán Kalocsay**
(Bildo el la Wikipedio)

## INVITO por OMAĜo al d-ro KÁLMÁN KALOCSAY

Estimplene mi invitas ĉiun karan leganton de nia revuo, al la memorfesto komenciĝanta je la 11a horo, la 6-an de oktobro 2011, en urbo Abaújszántó, Norda Hungarujo.
**Organizantoj de la festa programo estas de Abaujsanto**: sinjorino Burkuŝ-Imola Széphalmi: direktorino de la Kulturdomo „Petőfi Sándor, kaj **flanke de la esperantistoj:** Adrienne sinjorino Lászlóné Pásztor, loĝanta en urbo Miskolc (miŝkolc).
**La festa programo komenciĝos** je la horo 11a, la 6-an de oktobro 2011..
**La kolektiĝo okazos** en la Kulturdomo Petőf i Ŝándor (István király tér 4./placo reĝo Stefano, numero 4), de kie ni kune trairos en la Helytörténeti Múzeum/ Lokhistoria Muzeo sur la strato Béke/Paco, kie okazos la unua parto de la programo.
**La festa programo enhavos laŭ niaj planoj:**
/1/ **En korto de la Lokhistoria Muzeo**: post la aŭskulto de la Esperanto-himno, festan parolon diros sinjoro Georgo Madár: urbestro de Abaújszántó, lin sekvos saluto de s-ino Adrienne Pásztor delegito de UEA, poste salutparolon diras s-ro Imre Szabó: prezidanto de la Hungarlanda Esperanto-Asocio. La esperantlingvan kantadon de la profesia esperantista kantistino s-ino Anna Bartek (Anjo Amika: gvidantino de kulturaj aferoj de HEA) sekvos la rigardado de la Kalocsay-memorĉambro inter la ceteraj muzeaj ĉambroj, kaj enskribo en la Gastolibron.
/2/ **Ĉe la publikarea busto de d-ro Kolomano Kalocsay**: salutparolon diros ambaŭlingve sinjoro doktoro Balázs Wacha (Blazio Vaha) prezidanto de la Societo Kalocsay. Post lia saluto, la lokaj gelernantoj de la Bazlernejo donos festan programon permesite de la direktorino de la Bazlernejo. ilia instruistino estas: s-ino Ildikó Széphalmi. Ilian esperantlingvan programon sekvos hungarlingva kantado pere de sinjoro István Nagy: estanta li unu el la lokaj popolkantistoj. Lian kantadon sekvos florkronadoj kaj kandelbruligo, fotado.

/3/**<u>Ĉe la Kalocsay-stratet angula memortabulo</u>** sinjorino Pásztor rememoros pri estigo de Esperanto-memorejoj de la urbo, farintaj de geentuziasmuloj. Ŝian parolon sekvos la florkronadoj parte de la urbo kaj la ĉeestantoj..Se ĉio okazos laŭplane, ni povos aŭskulti ankaŭ hungaran blovinstrumentan muzikon pere de kurucepoka lignobeka fluto.
/4/ **<u>En la urba Publik-tombejo</u>** **<u>ni faros pietan viziton, ĉe tombo de patrino</u>** de d-ro Kalocsay. Sinjorino Pásztor rememoros pri la patrino, poste florkronado kaj kanelbruligo okazos. peret tiu evento finiĝas la festa programo.
Aliĝkosto ne ekzistas, sed la partoprenantroj estas devigataj porti florkronojn aŭ florojn!

**NE FORGESU ĈI INVITON! ALIĜU TUJ!**
**Honoru d-ron Kalocsay en lia naskiĝloko!**
**Atenton!**




Jen la restoracio Aba Vezér en Abaújszántó (Bildo el http://www.abavezer.hu/)

Post la festa programo, <u>vi povos refreŝigi vin</u> proprakoste per kafo kaj aliaj refreŝigaj drinkaĵoj en la restoracio ABA VEZÉR: kies adreso estas: Abaujszántó Jászai tér 9.(Placo Jásai, nro 9). Se vi volas tagmanĝi vi povos mendi: por vi +36 – 47-330-543, aŭ ĉe la posedanto: Ifj. Soltész Zoltán. E-mail: Abavezér Étterem<abavezer@abaujinfo.hu> Web. paĝo: www.abavezer.hu/index.php Sed, la mendinto ne forgesu, ke la de li menditan manĝaĵon li devas pagi ankaŭ tiukaze, se poste li ne volas konsumi ĝin. La organizantoj pagos anstataŭ neniu. <u>Urbo Abaujszántó, havas du fervojajn haltejon</u>: Abaujszántó-Fürdő kaj la tn. Grandan stacejon. Al la Kulturdomo, ili estas pr. samdistance. Sed, ĉar en la urbo ne ekzistas aŭtobusa trafiko, de la fervoja haltejo vi devos perpiede atingi la Kulturdomon, kaj ankaŭ la aliajn programejojn. Tiu marŝado por atingi la bezonatajn lokojn, bezonos ĉ. 15-20 minutojn, se vi ne promenadante iros.Mi proponas elekti la grandan fervojan haltejon kaj de tie iri al la Kulturdomo. De la fervoja haltejo iru malantaŭen, poste sur la deklivo sur la trotuaron iru ĉiam antaŭen dekstraflanke de la direkto. Vi trairos du pontetojn, preterlasos diversajn butikojn, kaj tiel vi atingos la Béke stratan buston de Kalocsay, poste la Lokhistorian Muzeon. Dumvoje maldekstre vi vidos la placon Jászai kun ejo de la foiro, malantaŭe la menciitan restoracion, poste la evangelian preĝejon, el ligno skulptitajn skulptaĵojn. En proksimeco de la Lokhistoria Muzeo staras la romkatolika preĝejo ĉirkaŭbarigita. Malantaŭ ĝi la vojo havas kurbiĝon kaj tuj apud ĝi vi ekvidos la blankmuran konstruaĵon de la Kulturdomo. Ne forgesu: se vi alvenos kun la trajno alvenanta ĉ. je la 11a horo, vi ne atingos ĝustatewmpe la komencon de la festa programo. Sed vi devas scii ankaŭ tion, kew sinjoro László Pásztor per esperanto-flago aterndos la festantojn je la trajno alvenanta ĉ. la 11a horo.

Feliĉan alvenon en urbon Abaújszántó! Estimplene invitis: sinjorino Adrienne Pásztor

## Ankaŭ en la ĉeha urbo Svitavy troviĝas Esperanto-Muzeo

**Pri nia muzeo vi povas vidi sur la paĝoj:**

http://www.ipernity.com/blog/181031/309387
http://www.ipernity.com/doc/181031/album/220015 Českomoravské pomezí
http://www.ipernity.com/doc/181031/album/220022 Akce a hosté v muzeu
http://www.ipernity.com/blog/181031/302426 článek o Ottendorferovi
http://www.ipernity.com/doc/181031/9790937/ filmík o Muzeu
http://www.ipernity.com/doc/181031/9964192 filmík o ČM pomezí

Kore salutas **Libuše Dvořáková** **dvor.libuse@seznam.cz**
**http://www.eventeo.net/web**

## Jan Werich - Humuro

Kiel ĉe la Hungaroj populara estis – ankaŭ nuntempe - la aktoro Géza Hofi, tiel populara estas ĝis nun Jan Werich, la fama ĉeĥa filmaktoro.Humuro de Werich estas tiel speciala, ligiĝante al humuro de la ĉeĥa intelektuaro, kiel estas atentebla ĉe Hofi ĉe la Hungaroj. Pro tio tiu tezo valoras, laŭ tio, se ni tradukas poemon alilingven, tiam tio estas sama kiel pri unu bela virino: ŝi povas esti aŭ fidela, aŭ bela, sed neniam samtempe.
Mi pensas, ke ĉi tio estas sufiĉa kiel enkonduko al citaĵoj de Werich.

/Artikolon de Teodor Andreras (Kassa) esperantigis László Pásztor /

## Citaĵoj de Jan Werich

„La vivo ĉiam meritis, meritas kaj meritos esti ĝisvivita. Fakte, kun ĝi ne eblas fari alian pli."
„La virinoj ne havas senton por malsenco"
„Se la viro ne havas saĝon, tiam la virino devas esti eltrovema. Se la virino ne estas eltrovema, tiam la viro estu saĝa."
/El ĉeĥa lingvo hungarigis Teo Andreas: SK, la hungarlingvan tekston esperantigis László Pásztor:HU, korektis Lubomir Fajth: SK/

# Funkcio de la Hungaraj muzeoj kadre de laMuzeoandragogio – alinome – Muzea Instruo de Plenkreskuloj

**Elektita tekstaro de la Unua Muzeo-andragogia Konferenco en Miskolc - Szentendre 2010**

La hungarlingvan tekstaron de la eldonita, baze servanta faklibro kompilis:
Mihály Kurta – Maria Pató

:**Recenzo:**

La eldonaĵo titolita „Muzeoandragogio aperis en 2010. dum la 1. muzeoandragogia konferenco. Ĝi enhavas prelegojn de 30 muzeaj fakuloj kaj epilogon de Jozefo Szabó el prelegoj de Muzeo de Hungara Lingvo en Széphalom la 11-12-an de majo 2009. Ĉi tiu verko estas unika en Mez-Eŭropo, muzea literatuta unikaĵo, muzea faklibro.

Mi nun deziras prezenti la hungarajn muzeojn laŭ la en tiu ĉi libro aperintaj tekstoj de la propran fakterenon havantaj fakuloj. Konigon de la en tiu ĉi libro estantaj muzeoj vi povas legi laŭ vicordo de la libro. La kursivliteraj tekstoj estas citaĵoj el la eldonaĵo, la normalliteraj partoj spegulas miajn opiniojn, proprajn tekstojn.

La Hungara Nacia Muzeo estis unua muzeo de Hungarujo, landa muzeo. Ĝia ĉefkonstruaĵo troviĝas sur la bulvardo Muzeo en la 8-a distrtikto de Budapeŝto. La klasikstila konstruaĵo de la muzeo konstruiĝis inter 1837 kaj 1847. Ĝin fondis grafo Ferenc Széchényi /1754-1820/. La antaŭon de la Miŝkolca muzeo „Herman Ottó" la Publikkleriga kaj Muzea Societo fondis en 1899, sub la titolo „Borsod-Miskolc-Muzeo. Oni malfermis ĝin je la 26-a de oktobro 1902. En la plej signifaj regionaj urboj de Hungario ĉefe inter 1869 kaj 1914 estiĝis la muzeoj, kiuj ekde siaj fondoj havis la taskojn por kolekti, prilabori, registradi, konservi kaj prezenti la objektajn heredaĵojn de la kulturo. Ĉi tiuj taskoj abundiĝis al nuntempo per la pretendo kiel diferencigi la originalajn valorojn de la falsaĵoj, kompreni kaj akcepti la religiajn kaj kulturajn diferencojn de individuoj apartenantaj al aliaj popoloj kaj kun tiuj kunvivi sur la sama tero. Ĉi tiu nova tasko bezonas novan edukadan sistemon ĉe ĉiuj tavoloj de la socio. Mi citas vortojn de sinjoro Mikelo Kurta, kiuj determinas la nocion de la muzeoandragogio, sur kiu baziĝas agado de ĉiuj muzeoj. „***La muzeoandragogio*** *esploras eblecojn, kondiĉojn de la muzeoj, muzeaj institutoj, civilaj komunumoj kaj ties organizoj, kiuj estas komisiite pri la defendo, konservo de la kultura heredaĵo. Samtempe ĝi volas malkaŝi tiuj laŭleĝecojn, kiuj ekstere de la muzeo fareblas por la plenkreskuloj, plenkreskaj komunumoj la ellernadon, memlernadon, instruadon.*

1/ La novaj sociaj postulatoj tiel realiĝas baze de raporto de **direktoro Stefano Vadász** en la Muzeo „Kiss Pál" de Tiszafüred /5350.Tiszafüred, Tariczky promenejo/,"*ke „la muzeo prezentas etnografiajn elementojn de Tiszafüred kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj la tie loĝanta fremdlingva loĝantaro kaj la tien vizitanta en,- kaj eksterlandaj turistoj povas ekkoni ĉi tieajn karakterojn de la hungaria kulturo. Ĉi tiuj fremduloj povas ekkoni la lokanojn pere de la laŭokazaj kaj konstantaj ekspozicioj kaj pli rekte ricevas travivaĵojn de la muzeo. Ĉi tiun ankaŭ tiu iniciato pliigas, ke po someroj en julio-aŭgusto oni faras ekspozicigvidadojn angle kaj germane por gestudentoj eĉ prelegas por eksterlandanoj."* Dum la vizito de la muzeo niajn spertojn, ni publikigis en nia Nordhungaria Informo (en 2010. novembra-decembra numero laŭ titolo „Vizito en Tiszafüred), prezentante la muzeon. La prezentadon de la potfarista regiona domo „Nyúzó Gáspár" okazos en iu sekva numero de nia revuo esperant,- kaj hungarlingve. Hejmpaĝo: www.museum.hu/tiszafüred/kisspal

2/ Dum la 1.Muzeoandragogia Konferenco okazis prelego de **Jozefo Kriston Vizi: Ni ĝisvivis, sed ne komprenis? Muzeaj okazintaĵoj maniere de plenkreskuloj.** Laŭ ĝi „ granda afero estis, ke fondiĝis en Dombóvár. la Lokhistoria Muzeo kaj de ĝia laŭplane agada Rondo de la Muzeaj Ornamaj Manoj. Oni diras en Dombóvár, ke ĝi estas arkeologion faranta urbo. Pro tio en la muzeo lokhistoria memkleriga rondo funkcias. La pli fruaj kaj nunaj fosadoj kaj ĝiaj travivaĵoj, ĝojoj de la malkaŝo kaj ektrovo, ekscitoj de la identigo de la

fakuloj kaj la teo-posttagmezoj igas alloga la muzeon. Adreso: Lokhistoria Muzeo, 7200. Dombóvár str. Szabadság 16.
3. **Tomaso Vásárhelyi:** Iu sistemo de agado de Muzeoandragogio kaj la ellernadaj eblecoj por la plenkreskuloj en la Hungara Naturscienca Muzeo.
„*Esence la instruado de muzeoandragogiajn agadojn farantoj krom Debrecen okazas en Budapeŝto en la Naturscienca Muzeo kaj en la Subĉiela Etnografia Muzeo en Szentendre.*
La laborantoj de la Hungara Nacia Muzeo kaj la Belarta Universitato dum komuna supergrada restaŭrator-instruado *instruis la studobjekton; zoologio kaj damaĝbestoj. Ĉiujare ili instruas ankaŭ alie kelkajn horojn. Ekz. en la Muzea Instrua Centro. Ili organizas perfektigajn kursojn kunlaborante kun la Hungara Media Edukada Societo."*
Nova tereno estas la informa lernado, kiun protektas ĉiuj klerigaj institutoj. Ĝiaj elementoj estas: retpaĝo, regalo de eldonaĵoj, ekspozicioj, instruado de la laborantoj de la muzeo.
Esence ĉi tiuj terenoj ankaŭ delonge ekzistis, sed nun oni devas atenti pri ili laŭ mia opinio pliigite. La Hungara Naturscienca Muzeo estas la plej granda naturscienca kolektaĵo /retrografia, geologia, paleontologia, andropologiade Hungarujo./ Adreso: Budapeŝto, 1083, placo Ludovika 2-6.
4./ **Maria Pató: „**Novtipaj muzeaj renkontoj" Ŝanĝantaj pretendoj – ŝanĝantaj muzeoj. laŭ ekzemplo de publikkleriga muzeopedagogia modelo de la pasintaj dek jaroj de la Muzeo Damjanich János. La prelego komenciĝis ĉe konfeso de la preleganto, tiun kreis pri la muzeoj. Mi citas: „*Mi kredas, ke la muzeoj ne estas sarkofagoj de la efemereco. Mi kredas, ke la muzeoj estas anoncoj de la vivo, kiel la naturo, la socioj kaj la homo. La muzeoj estas gardistoj de okazintaĵoj de la pasinto kaj de ni mem.* „ Laŭ tiu ĉi pensoj oni estigis en muzeo Damjanich János la Galerion, etnografiajn kaj historiajn konstatajn ekspoziciojn por konservi la lokhistoriajn, arkeologiajn valoraĵojn de la Hungara Ebeno kaj por prezenti al multe da homoj. La moderna muzeo klopodas estigi vizitantojn ŝatantan muzeon, kie la vizitado povas pasi tuttagon. Ekde 1991 oni okupiĝas pri organizado de la „Eŭropaj Heredaĵaj Tagoj", por plenkreskuloj kaj por infanoj. Ĉi tiu estas tradicia aranĝaĵo, kiu komenciĝas antaŭe de septembro de ĉiuj jaroj kun internacia malferma festo. Tiun partoprenas la reprezentantoj de la membroŝtatoj de la Eŭropa Unio kaj reprezentantoj de la Eŭropa Konsilantaro. Ĝia celo estas por atentigi por defendi niajn kulturajn heredaĵojn. La 18-an de majo oni aranĝas Internacian Tagon de la Muzeoj. Simile al Budapeŝto oni aranĝas la Nokton de muzeoj. La aranĝaĵo „Fajro de Sankta Ivan" donas eblecon por la muzeo iĝi komuna scenejo: forumo de renkonto de la homoj. Ĉi tiuj programoj estas ege multkoloraj. La ekde 2005 staranta konstruaĵo de la Szolnoka Galerio estas nun la plej granda ekspozicia halo de la Ebeno. Ĉi tiuj programoj estas ege multkoloraj. Konstruaĵo de Galerio de Szolnok estas nun la plej granda ekspozicia halo de la Ebeno. La metiistaj prezentoj, kiujn aranĝas la direkcio de Jász-Nagykun-Szolnok departementaj muzeoj, prezentas la nunajn kaj malnovajn valoraĵojn de la popola manlabora industrio kaj popolarto pere de la metiistoj vivantaj en la departemento. La metiistaj prezentoj, kiujn aranĝis direkcio de Jász-Nagykun-Szolnok departementaj muzeoj, kiuj prezentas la nunajn kaj malnovajn valoraĵojn de la popola manlabora industrio kaj popolarto pere de la en departemento vivantaj metiistoj. En 2008 komenciĝis la programo „Muzeoj tagmeze" . Ĉefe ĝi okupiĝas pri la fosadoj laŭ la rivero Tibisko. Tiuj prezentas kulturojn de epokoj, popoloj, aplikante la muzeopedagogian sciencobranĉon. Simila instruada metodo estas ekz. la ankaŭ teleinstruado, sed ĉiam en teoria rilato akordiĝas al la kolektada tereno de la koncerna muzeo. Laŭ la eblecoj evoluigas la muzeojn. Oni estigas vizitantcentrojn, ilustroĉambrojn por helpi la ekkonon kaj komprenon de la iamaj vivoj de la Jazigoj kaj Kumanoj. Por infanoj la muzeo eldonis muzeopedagogian kajeron kun titolo „ Ĉirkaŭ la domo de niaj gaston atendantaj prauloj". La muzeo Damjanich ricevis lokon en la iama hotelo Király, kiu konstruiĝis en 1860. Ĝia nomdonanto estas Johano Damjanich, generalo de la 1848-1849. jara revolucio kaj liberecbatalo, kiu venkis dum batalo de Szolnok

Adreso: 5000. Szolnok, Placo Kossuth 4.

5./ **Sarolta Szabó:** Muzeaj horoj en la Muzeo Báthori István

*„La Muzeo Báthori István de Nyírbátor – fondis Stefano Szalontai en 1955. – jam pli ol 50000 objektojn konservas: en siaj etnografia, lokhistoria, armilhistoria, numismatika, belarta kaj industrihistoria kolektaĵoj, kiujn kompletigas datumstoro, fotostoro kaj biblioteko.*

*La muzeo organizas ĉiujare fakajn renkontojn kun pedagogoj de la urbo /14000 loĝantoj/. Loko de la renkontoj estas la muzeo. La kontakto de la muzeo kaj pedagogoj estas bona. Efike de tiu oni organizis la ekspozicion „Jardekoj de Nyírbátor" kaj la al ĝi kroĉiĝantajn muzeajn horojn por la 5. 6. 7. 8. klasoj. Dum tiu ĉi muzeaj horoj oni prezentas la literaturajn memorojn, faron de argilujoj, prilaboron de la kanabo, farbon, tekson, plekton de la fadenoj, kolorojn de la ornamaĵoj, ktp."* Krom la menciitaj ekspozicioj kaj landlimdefendanta ekspozicio la muzeo havas ankaŭ aliajn intresaĵojn, kiuj estas indaj por rigardi. Adreso: Muzeo Báthori István, 4300. Nyírbátor str, Károlyi 21.

6. **Andrea Pásztor:** Ekskursantaj muzeologoj.

„Historia Klaso de Muzeo Janus Pannonius de Pécs lanĉis en majo de 2008 programserion ~~la~~ titolan Muzeaj ekskursoj en monto Mecsek (meĉek).*Tio invitas tiujn por partopreni ekskursojn, kiuj interesiĝas pri naturoj, lokhistorio arkeologio, etnografio. La ekskursojn partoprenas aktivaj aŭ emeritaj muzeologoj de la naturscienca, etnografia, arkeologia, belarta kaj historia klasoj de la muzeo, por kiuj la ekskursoj estas malkaŝantaj vojoj. La ekskursojn ekirigas tria sabate de ĉiuj monatoj la ekskursgvidantoj de la Societo Mecsek."*

La konoakiro, ĝuo de la naturo, vidaĵo de la valoraĵo faras interesa ĉi tiujn ekskursojn. l la Muzeo de Pécs estas la plej granda regiona muzeo de la lando, esplorejo de la Hungara Scienca Akademio. Ne serĉu kiel ekspoziciejon - multaj muzeoj apartenas al ĝi. La 18. jarcenta baroka kanonoka domo estas la rezidejo de la Direkcio de la Baranya Departementaj Muzeoj. Adreso: 7621, Pécs, str. Káptalan 4.

7./ **Maria Újvári:** Muzeaj metiistaj ekzercoj por infanoj kaj por plenkreskuloj.

La Muzeo de Gömőr malfermiĝis en 1987. „Ili aranĝas ovoornamigajn ekzercojn ekde la fondo. En la vilaĝo Ragály vivanta s-ino Emerigo Hárskuti gvidas la ekzercojn, kiu estas farantino de la fame brodita ovo de Gömőr. La ovoornamado ne pretendas multe da materialoj, sed oni bone devas koni ĝiajn ilojn, elekti la farbojn, la kvaliton de la vakso kaj teknikon de la faro. Oni ornamas la malplenajn, aŭ kuiritajn ovojn laŭ ŝia tekniko. Unue oni forigas la flavon kaj albuminon de la ovo, la ŝelon purigas kaj la modelon metas sur la ovoŝelon. Ankaŭ membroj de la skoltogrupo lernas teknikon de la ovopentro kaj ankaŭ el eksterlando multaj homoj alvenas por lerni tiun ĉi teknikon. En 2006-2007. la societo „Putnok kaj ĝia ĉirkaŭaĵo" gajnis konkurson en temo „Renoviĝantaj Tradicioj-Popolkutimoj kroĉiĝantaj metiistaj agadoj en Gömőr". La projekto donis eblecon por enlernejigi 16 senlaborajn sinjorinojn. La instruado okazas en 4 temoj. Ĉi tiuj estas: 1. puntobato, 2. teksaĵkono, 3. ornamo de farba ovo, 4. gastronomio. Al tiu ĉi ddonis subtenon ankaŭ la urbestro de Putnok. La ekzercon partoprenas lernejaj infanoj, pedagogoj, emeritoj, aŭtistaj infanoj, handikapuloj kaj loĝantoj de rehabilitaj institutoj. Tutlande kaj eksterlande oni konas kaj rekonas la artajn branĉojn de Gömőr.

Adreso: 3630. Putnok, Placo Serényi László 10.

**8./ Maria Káldy:** Programoj de de instruado de plenkreskuloj en la Muzea Instruada Centro.

*„Ekde plurjarojn formiĝanta imago de la Hungara Instrua kaj Kultura Ministerio kaj la Subĉiela Etnografia Muzeo (Szentendere) realiĝis en majo de 2006, kiam ili estigis tie la Muzean Instruan Centron. La gvidantino de la Cenro iĝis s-ino Maria Káldy. Ties kaŭzo kaj celo estis, ke la muzeaj fakuloj ekkonu la postulaĵojn pri la modernaj muzeoj. La skanseno dum la lastaj tridekjaroj iĝis adepto de ideo de la „malfermita muzeo". Ĉi vidpunkton naskiĝi helpis la specialaj ekspozicioj enhavantaj mueopedagogian agadon kaj bonan kontakton kun*

*la vizitantoj. Ĝi akiris elstaran oficistaron por la lerneja instruado inter la muzeoj. Ĝiaj programoj por ĉiuj aĝklasoj vekis interesiĝon. La muzeo realigas la akreditan instruadon por pedagogoj dum 30 horoj, kies unua prelego estis la prelego, titolita „Komuna mondo de la homo kaj la arbo." Rolo de la muzeo iĝis grava en la universitata instruado, ja la sciencaj kunlaborantoj dum la lastaj 30 jaroj partoprenis la instruprogramojn de la diversaj universitatoj, kiel prelegantoj.(Scienca Universitato Budapeŝto /ELTE/, Universitato de Debrecen, Sciencuniversitato de Pécs, Teknika Universitato de Budapeŝto) Ĉiam pli kaj pli multaj studentoj elektas la lerneblecojn en tiuj fakinstruadoj: etnografiisto, arkitektoria inĝeniero, interna konsatruartisto, artobjektodefendo, restaŭratoro, pejzaĝkonstruisto, pedagogo, andragogo, kuracpedagogo, bibliotekisto, ks. Ili ekirigas anksŭ kursojn, ekzemple:puntolernejan, bioĝardenkulturisto, potfarista metio, hejma apoteko el la naturo kaj aliajn. En 2002 ili estigis la fakan interesfederiĝon (Asocio de Humgaraj Regionaj-Domoj), kiu renovigas la enlandan Regiondoman movadon kaj helpas la pli bonan funkciadon de la etnografiaj kolektaĵoj.*
*De 2009 ekviviĝis la programo: „Muzeoj por ĉiuj" kiu subtenas pere de Eŭropa Unio kaj la enlandaj fontoj la modernajn ekspoziciojn de la muzeoj kaj la amuzajn travivaĵdonajn instruprogramojn."* La Subĉielan Etnografian Muzeon en Szentendre oni fondis en 1967. Ofte oni nomas ĝin simple al skanzeno de Szentendre. La muzeo situas sur naturprotektada teritorio. Ĝi estas la plej granda subĉiela kolektaĵo de Hungario. Ĝi prezentas la popolan arkitekturon de karakteraj regionoj de la lando, loĝejkulturon, vivmanieron de diversaj tavoloj de la vilaĝa kaj kampurba socio.
<u>Adreso: 2000, Szentendre, vojo Sztaravodai.</u>
**8./ Judita Bence - Beáta Répási:** <u>Uzado de eblecoj de la muzeo en la andragogia instruado al la t.n. procezo de Bologna</u>
*„Tiu ĉi en tuta Eŭropo enkondukas la 3 ciklan supergradan instruadon. La studentoj unufoje partoprenas 3 jaran bazinstruadon. Poste ili ricevas unun diplomon. Tiu similas al la abiturentposta supergrada fakinstruado. Poste la studentoj partoprenas du jaran majstroinstruadon. Post tiu ĉi la studento ricevas supergradan diplomon kaj iĝas fakulo.*
*Poste sekvas la tria ciklo, la doktora instruado por iĝi esploristoj. Nia instituto en Pápa elektis la pedagogian fakon. Ĝi estas memstara, ne sekcio. Ĝi havas ambaŭ tri instruajn terenojn kun akredititaj programoj kaj instruistaroj."*
*„La instruado de Kodolányi János ĉeflernejo sekvas 3 partojn de la enlanda supergrada instruado post la ŝanĝo Bologna:1. bazinstruado dum 3-4 jaroj, 2. majstroinstruado dum 2 jaroj- turismo, gastigado, mastrumado, manaĝero, internaciaj eseoj, 3. faka instruado – eblas anonci kun supergrada diplomo. La studento ricevas diplomon. „*
En la Meza Transdanuba Regio funkcias unu universitato kaj 3 Ĉeflernejo, krome la Universitato kaj Ĉeflernejoj havas elementajn sekciojn. Pápa estas Atheno de Transdanubo. En Pápa estas la Muzeo por prezenti la blupentradon de teksaĵoj.
**9./ Atilo Utry:** <u>Muzeaj adaptaĵoj de akredititaj kulturaj kaj artaj instruadoj.</u>
La preleganto antaŭ sia temo citis vortojn de Konfuceo pri bezono de la lernado: *„Kiam la scio disvastiĝas, tiam la volo estas sincera. Kiam la volo estas sincera, tiam regas la racio. Kiam la racio regas, tiam la individuo estas kulturita. Kiam la individuo estas kulturita, tiam la komunumo vivas en akordo. Kiam la komunimo vivas en akordo, tiam tiam la lando estas bone regebla. Kiam la lando esta none regebla, tiam ĉie estas paco."*
En Baja ĉe la Ĉeflernejo „Eötvös József" ankoraŭ ne estas instruado de andragogoj nun en 2010., sed la ĉeflernejo dezirus kunlabori kun la muzeoj por prilabori la programojn. Ĝi proponis la fakojn, kie povas realiĝi la instruadoj de prelegantoj de la muzeoj: ĉi tiuj fakoj estas la ĝeneralaj artaj konoj, kaj specialaj instruadoj. El inter pli lastaj ekz: „ ne profesiala popolkantrondon gvidanta, belarta kaj metiarta grupgvidanta teatran grupon gvidanta. Kadre de la popolklerigo entreprenita instruado tiukaze certigas pli bonan profitadon de la kulturaj

eblecoj, se la kulturo retiriĝas en fonon en nia ekonomian kaj politikan interesitecon havanta socio. Ĉi tiu estas tre grava klopodo, ĉar en 70 %-oj de malgrandaj setlejoj – kie estas pli malmulte ol 1000 loĝantoj – jam ne estas lernejo, preĝejo, muzeo kaj publikkleriĝa fakulo. Kaj la instruado,, kiu certigas la instruadon de la novaj fakuloj, ne havas konkretajn eblecojn la supergradaj instruadaj procesoj de Bologna." La Muzeo „Türr István" de Norda Bácska estas regiona muzeo de la norda parto de eksfortikaĵdepartemento Bács. Tiu muzeo kolektas muzeajn valoraĵojn de ĉi tiu teritorio kaj prezentas al la vizitantoj. La kolektaĵo havas pli ol 40000 pecoj da aĵoj, el inter multaj devenas el epoko de la popolmigrado kaj el epoko de Avaŭroj. Ĉi tiu kolektaĵo konservas trovaĵojn de la malkaŝita sarmata tombejo., kiu estas sola en tuta Eŭropo. Adreso: 6500, Baja, str Deák Ferenc 1.

**10./ Edit Újvári:** Muzeo-andragogiaj okupiĝoj en la Regiona Tutarta Centro

*„La Regiona Tutarta Centro ricevis lokon en unu el la plej belaj konstruaĵoj de interna urbo en Szeged, en la secesia stila Reök-palaco, kvankam ne tute estas muzea instituto, ja ne havas konstantajn ekspoziciojn, tamen ĝia misio estas la perado de la muzea kulturo. La ekspozicioj servas kiel kadroj de muzikaj, literaturaj, dancartaj programoj, realigante la tutartajn klopodojn. Dum la tuta vivo okazanta lernado signifas la daŭre kaj intermite ripetiĝantajn procesojn." Esence tiu similas al la hungara onidiro, laŭ kiu : „ Eĉ la bona pastro lernas ĝismorte."* La plej sukcesa ekspozicio de 2008.estis la:„Elektado el la klasikaĵoj de la hungara pentrado." La interesiĝantoj povis ekkoni en 2009. la pop-art kaj samtempulajn artajn klopodojn. En 2010. oni povis rigardi 72 verkojn: akvafortojn kaj grafikojn de Rembrandt. Oni povis viziti al Palacon de Reök por rigardi akvafortojn de Rembrandt. En Palaco de Reök oni povas rigardi Kristnaske senpagajn ekspoziciojn de Palaco de Reök. La fama kulturcenntro per sia saĝe organizita programaro merite iĝis la ŝatata kultura centro de urbo Szeged. Adreso: 6720, Szeged, Bulvardo Tisza Lajos.

**11. Kristina Foghtűy:** Muzeopedagogia instruado en la supergrada instruado

La prelegantino prezentis muzeopedagogian fakinstruadon de la Pedagogia kaj Psikologia Fakultato de Sciencuniversitato Eötvös Lóránd. Ŝi parolis pri la rezultoj de la instruado. *„ La muzeopedagogio estas relative juna, ne elformita sciencobranĉo, sed la studentoj taksas tiun kiel bona. Ili devis daŭrigi same la instruadon. La muzeaj ĉefurbaj kunlaborantoj estas ties gravaj rolantoj. Ili estas fake instruitaj, forte apogis la ekirigin de la instruado. La muzeopedagogio – laŭ la pedagogia leksikono - estas tiu teritorio , kiu pereas inter materialoj, ekspozicioj, esplorlaboro de la muzeo kaj la vizitantoj de la muzeo kaj okupiĝas kun la infan,- kaj junularklasaĝoj. En la muzeoj unurangaj iloj de la instruado estas la studobjektoj, sed estas gravaj ankaŭ la kromlerneja informaĵoj. Sed la studentoj rekonas, ke ambaŭ estas bezonata."*Nome la en muzeo okazanta instruado pretendas sciojn de la muzeologoj kaj pedagogoj. Ĉi tiel ni devas konsideri ecojn de la muzeo. Dum la evoluigo kaj plenumigo de la muzeopedagogia programo samtempe ĉeestas: apliko de la objektoj, prezento de la celoj, funkcioj de la muzeo kaj la homa kontakto por helpi la lernadon.

**12. Adrienn Kárpáti:** Plenkreskulinstruadaj programoj, konferencoj kaj metiejlaboroj de la fondaĵo„Muzeoj kaj vizitantoj" /Budapeŝto *„La-fondaĵo Muzeoj kaj vizitantoj" estiĝis en 2004., celante por helpi la hungarajn muzeojn, por korekti, por plibonigi la kontaktojn kun la vizitantoj kaj por igi al populara la muzean kulturon. Pro tiu ĝi organizas konferencojn kaj metiejlaborojn. La pli lastajnt ilia retpaĝo vidigas. Ĝi faras eldonaĵojn, metodikajn skribaĵojn al la fakuloj kaj pedagodoj, tradukas, redaktas, eldonas. Ĝi estas partoprenanto de projektoj de EU, sed ankaŭ organizas projekton kaj efektivigas tiujn* – mi legis la informon.

**13. Gertrud Goda:** Videbligo – Valorhierarkio – ekspozicio/ Internacia Muzea Libera Lernejo por Plenkreskuloj



Miskolc, Muzeo Herman Ottó (Bildo de la Wikipedio)

La preleganto skizas mallonge, ke la muzeaj kunlaborantoj estas specialigitaj fakuloj. Ŝi estas arthistoriisto kaj komence de ŝia kariero estis ekzemplon montrantaj personoj, el inter kiuj estis elstara la instruisto, Jozefo Dési, kaj por ŝi la al fortikaĵoj planitaj Steloekzercoj estis superregaj en Gyöngyös, dume oni fondis la Muzeon Mátra. Sed estis ankaŭ bonvolaj helpantaj patriotoj, ekz. en Tokaj Nikolao Pap, verkisto /en siaj verkoj li prilaboris famaĵojn de Tokaj sub titolo „okazintaĵoj de Tokaj" , kiuj mankas el la historiolibroj. Li verkis legendomondon de Tokaj kaj skribis elektaĵojn el kantoj de Tokaj./ Pentroartisto Tibor Tenkács, kiu penadis levi nivelon de nia loĝejkulturo. „ Nun mi prezentas unu plenkreskulan kreantan grupon – daŭrigis la prelegantino - tion, kiel estiĝis la grupo, kiajn utilajn programojn ni trovis, kiel ni utiligas organizajn, artajn spertojn de niaj slovakaj, polaj, rumanaj geamikoj. Se mi dirus muzeoandragogian ĵargonon: nia celo estis helpi la meminstruadon de plenkreskulaj talentoj kaj zorgi pri ili. (Mi povas diri tiel, ĉar ankaŭ mi estas plenkreskula membro de la grupo.) La kerno de la societo konsitas el konatularo (en Miŝkolco funkciantaj desegnadintruistoj), iamaj studentamikoj , poste kunlaborantoj. La vivoaĝo de la membroj estas grandskala: de la 20-a jaraĝo tra la aktivaj laborantoj ĝis la emeritoj, kiuj „perdis" pentroartiston Johano Seres, kiu kapablis kunteni desegnantojn de la regiono. La prelegantino kaj ŝia grupo por atngi siajn celon taksis plej taŭga la muzeon 'Herman Ottó' de Miskolc kaj estigis ĝian sekcion de desegnadinstruistoj . La grupo faris urbon plibeligajn laborojn kaj ekspoziciojn kun slovakaj kaj polaj artistoj. Ili ne konkursas, ne volas suferi malsukcesojn. Pro tio ili laboras kiel civila societo. Ili taksis kiel estimo, kiam d-ro László Veres direktoro de la Muzeo Herman Ottó de Miskolc rekonis iliajn laborojn kiel muzeaj valoraĵoj kaj en 2009. entreprenis por inaŭguri iliajn ekspoziciojn en la miŝkolca urbon plibeliga societo / en domo de Kós./ Ili faras ankaŭ plumodesegnaĵojn, pentras sur tolon per oleo, faras akvarelojn eternigante kelkajn partojn de Miskolc. Ili povas kontribui tiel al vidiga kreado de valoraĵo.

**13/A.** Mi almetas al raporto de la prelegantino, kiu forloĝiĝis el Gyöngyös, ke la Muzeo Mátra de Gyöngyös (Djondjoŝ) funkcias en du konstruaĵoj de la ĝardeno Orczy /en la kastelo kaj en Pavilono./ La du konstruaĵoj situas en angla parko, en kiu kreskas raraj floroj kaj pompas lageto kun orfiŝoj. En la pavilono ni povas miri pri palmejo kun interesaj egzotikaj plantoj kaj bestoj inter ceteraj, sed ĉiam inter naturaj cirkonstancoj. El inter la muzeaj gardistoj elstaras Tomaso Kecskés, ĉambregogardisto, kiu estas alte instruita ankaŭ pri muzeaj sciindaĵoj, bonvola kaj plej bona reprezentanto de la muzea personaro. Kiel muzea parolpartnero diris ankaŭ tiun, ke la Muzeo Mátra rekondukas la malavantaĝan situon havantajn homojn al la ĉiutaga agada vivo. Ĉiu ĉambrogardisto estas invalida emerito, kiujn dungas la muzeo kaj helpas solvi iliajn socialajn zorgojn. Pri la muzeokadraj instruadoj de

infanoj, plenkreskuloj en la Muzeo Mátra, mia parolpartnero ne havis informojn. Se povas esti, ke ili ne partoprenas tiun muzean prpogramon, tio certe ne malvalorigas la institutonm, ĉar ili abunde havas ĉiuspecajn informilojn aĉeteblajn, kaj senkostajn, kaj tiuj hejmenporteblaj legindaĵoj povas anstataŭigi la personajn kontaktojn inter muzeologoj kaj ĉiuaĝaj vizitantoj. La muzeo altvaloras kaj meritas la viziton. Iru tien por konvinkiĝi pri tio! En la urbon ni alvenis aŭtobuse, de tie pertrajne vojaĝis hejmen al Miŝkolco. Ni sciiĝis kun bedaŭro, ke la urbo havas tre malzorgitan fervojstacion, kiu ne estas inda al la Muzeo Mátra: tiu unika trezoro de nia lando, kiu donas al la vizitanto neforgeseblan travivaĵon. La Muzeo Mátra estas proksime al la fervojstacio kaj aŭtobusstacio. /dek minutoj piede./, komforte promenante. (s-ino Adri Pásztor)

En la Muzeo Mátra. sur la foto videblas laĉambrefgo gardisto kun la mamitostaro

Pri la Muzeo Mátra in formojn vidu ĉe:: www.matramuzeum.hu

Ĝiaj tingeblecoj - adreso: 3200.Gyöngyös str. Kossuth Lajos 40.

E-mail: matramuzeum.gyongyos@gmail.com

**14./ Katarina Cserjés:** Muzeopedagogio en instruado de plenkreskuloj kaj en la publikklerigo. /andragogio/ kazostudoj

La prelegantino komencis siajn universitatajn kursojn- muzeopedagogian, pli ĝuste bildo-teksto legadan, ekspozicion vizitadan, arthistorian, plu fakterenojn atinganta, internan terenon atingantaj kursoj - post multjaraj esploroj en 2004. Same tiutempe ŝi ekirigis en sia loĝloko, en Hódmezővásárhely siajn galerion vizitadajn laŭtemajn muzeajn ekspoziciojn gvidantajn programojn. Ilia publiko estis, la tuta loĝantaro de la urbo, sed ĉefe lernejaĝaj, emeritaj, kulturrondoj, emeritaj kluboj. homoj de socialaj establaĵoj, kiuj pli frue iĝis emeritaj, aŭ senlaboraj loĝantoj. La Arthistoria Memkleriga Rondo funkcias en la Loka Kulturcentro sub ŝia gvidado, kaj kunlaboras kun diversaj aliaj muzeoj kaj konkursas pri diversterenoj de la muzeaj sciencobranĉoj, utiligante siajn spertojn kaj spertojn de aliaj prelegantoj en instruado de la infanoj kaj plenkreskuloj. Al teksto de la prelego ŝi aldonis temoliston ilustrite per bildoj. La Galerion de Ebeno oni fondis en 1985.

Rigardo de la Galerio de Ebeno donas neforgeseblen travivaĵon por amantoj de la hungara pentroarto. Adreso: Hódmezővásárhely, Placo Kossuth 8.

**15. / Zsolt Orbán:** Familion ŝatanta muzea modelo – Ottó Herman en la hungara scienco.

*„Multflanka estas la verkaro de Ottó Herman. El siaj verkoj estas videbla lia pasia multflankeco, inspiranto de multaj literaturaj kreaĵoj. Personeco de Ottó Herman kunligas sciencoterenojn kaj muzeojn, liaj verkoj estas ligiloj ankaŭ inter la natursciencistoj kaj sociosciencistoj."* Pro tio elektis la preleganto vivon, kaj verkaron de Ottó Herman enkonduki la temon, ĉar al la familion ŝatanta muzea modelo liaj klopodoj, celoj estas kompetentaj kaj ekzemplon donantaj. Reala ekzemplo de tiu ĉi penso estas la memordomo de Lillafüred, kie la kun familioj alvenantaj infanoj ludante povas ekkoni la birdojn, araneojn, fiŝojn kaj metodojn de la fiŝkaptadoj. La Direkcio de BAZ- departementaj Muzeoj rezidas en konstruaĵo de la Muzeo Herman Ottó, en strato Gőrgey. La Muzeo Herman Ottó estas la plej granda Muzeo de Miskolc, ĝi havas pli ol 600000 artobjektojn. Ĉefe ĝi kolektas belartajn kreaĵojn, arkeologiajn trovaĵojn, mineralojn, sed estas signifa ankaŭ la etnografia kolektaĵo.

Adreso: 3534. Miskolc str. Gőrgey 28.

**16./ Csaba Benedek:** Valoraĵo kaj/aŭ modo? Harmonio inter esencaj kaj pli novaj tendencoj: laŭ modelo de ekspoziserio.

La preleganto komparas tiujn du nociojn kaj konstatas la konkludon: *„Kio estas vera valoraĵo, tio restas ĉiam valoraĵo. Kio estas modo, tion oni forgesas. Strukturo kaj konsisto de ĉiuj etnografiaj kolektaĵoj spegulas tiujn principojn, imagojn, laŭ kiuj estiĝis. Laŭ modo de nia epoko ofte okazas, ke ne muzeaj personoj faras proponon por fari ekspoziciojn, aŭ proponas al la fakuloj, aŭ mem aranĝas propran ekspozicion. La sen fakuloj aranĝitaj ekspozicioj malhavas la fakan sperton. Al tiuj oni ne faras scenarlibreton, oni ne konas kapaciton de la*

*muzeo, ne konas la kvanton de la prezentendaj artobjektoj."* La preleganto anoncis kunĝoje, ke la de muzeaj fakuloj organizita aranĝaĵserio 'Metio sen landlimoj' estis eksterordinare suksesa kaj enlande kaj eksterlande: en Slovakio kaj ĉe la Sikuloj kaj ĉe la Ĉangooj en Rumanio. Ankaŭ la blinduloj kaj la malbone vidantoj povis ekkoni artifikojn de kelkaj metioj. Ĉi tiel ili povis informiĝi pri pasinto de la metioj, pri la nunaj modaj metioj kaj povis ekkoni nunan situacion de la prezentitaj fakterenoj. Fine la preleganto de Szolnok resumis la atingitajn rezultojn: *„Ni povas diri, ke la 'Metio sen landlimoj' ege sukcesa estis. Oni interesiĝis pri la ekspozicio, la prezentado kaj la foiroj. Ni prezentis la majstrojn de departemento Szolnok en la tuta baseno Kárpát, kiuj prezentis siajn produktaĵojn. Oni povis ekkoni pasinton de la metioj kaj videblis la nunon de la fakoj. Pro la granda interesiĝo ni preparas la tran ekspoziciserion sub titolo 'Rafinitaj', en kiu ni prezentas la plekton, , plektaĵojn kaj iliajn majstrojn."*
Laŭ mia opinio la hungaraj muzeoj faras ĉion en ties intereso, ke konigu kun la publiko la lokan kaj tutpopolan kulturon. Al tiu ĉi laboro mi deziras multan sukseson kaj instruitajn kunlaborantojn, ĉar laŭ la malnova onidiro „ la forto estas en la unueco, en la kunlaboro."
Fine mi dankas al la aŭtoroj de la 309-paĝa libro, la peton, por komuniki de mi ĉi tiun tre valoran muzean informilon hungarlingve kaj esperantlingve.
/La hungarlingvan tekston de s-ino Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor, kontrolis J. Cziboly

## Funebro

### Forpasis Ladislao Deme, amanto de la hungara lingvo

En la 90-a jaro de sia vivo forpasis Ladislao Deme, fondinta kunprezidanto de la Asocio de Patrinlingvon Zorgantoj. La nelacigeblan organizanton de la lingvokulturada movado atingis la morto la 6-an de junio. Laŭ lia deziro oni adiaŭigis lin en malvasta familia rondo. Ladislao Deme naskiĝis en 1921 en Pécel. Li estis universitata instruisto, kiu esploris la demandojn de la dialektoj, lingvokulturado kaj lingvouzo. Li estis elstara pedagogo, kiu opiniis grava la sciencpopularigan kaj lingvokulturadan laborojn pri la hungara kaj Esperanto-lingvoj. Li famiĝis pere de la lingvokulturada radioserio „Paroli estas malfacile" kaj antaŭ la publiko kaj inter la lingvistoj. /MTI – Hungara Informiga Oficejo./
Ladislao Deme estis honora prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio/HEA/. Kolektaĵon de liaj verkoj HEA aperigis sub titolo: „Estonto de niaj lingvoj kaj lingvo de nia estonto."
Mi konatiĝis persone kun li, kiam aperis miaj du verkoj: „Eŭropa Unio kaj la lingva demando" kaj ĉefe „Komuna lingvo de la multeco." Por tiu lasta mi ricevis rekomendon kaj la eblecon republikigi lian pli malnovan verkon „Patrinlingvo kaj dua lingvo."

/La hungarlingvan sciigon de László Gados esperantigis László Pásztor/

**Mortis granda Eŭropano**

Posted by  Anton Oberndorfer to Esperanta Retradio

Post feriosemajno mi revenis al mia hejmo pasintan sabaton. La vojaĝo daŭris preskaŭ 7 horojn, do mi estis sufiĉe laca dimanĉon matene kiam mi registris la sonartikolon pri Tofuo. Tio estis rimarkebla en mia voĉo ĉar mi parolis iom pli malrapide kaj kun pli da baso. Do ne temis pri teknika problemo kiel aŭskultanto supozis. Dimanĉon mi havis tempon por ripozi, sed lundon atendis min nova defio: veturi al Vieno por tie viziti niajn filojn, precipe por transporti kelkajn akcesoraĵojn por la loĝejo en Vieno. Tiuj 200 kilometroj en si mem tute ne estas granda afero, sed mi petis mian edzinon stiri la aŭtomobilon, kion ŝi volonte faris.
Nun posttagmeze mi sidas ĉe la tablo de la viena loĝejo kaj verkas tiun ĉi sonartikolon. Kiel ĉiutage mi bezonas temon por havi ion por skribi. Bedaŭrinde en la loĝejo mi ne havas aliron

al interreto, nur vespere per portebla telefono. Do mi devas trovi temon en la gazeto kaj tial mi trafoliumis ĝin.
Kaj temo ja ekzistas, kiel la entombigo de la filo de la lasta imperiestro de Aŭstrio, Otto Habsburg en Vieno pasintan sabaton. Tio estis grandega ceremonio, la lastan fojon eblis tiel nostalgiumi pri la pasinta monarkio. En la katedralo Sankta Stefano oni kantis eĉ la imperiestran himnon en la ĉeesto de la federacia prezidento kiu montris ŝtoniĝintan mienon dum tiu momento. Nome post la disfalo de la aŭstra-hungara regno en 1918 Aŭstrio fariĝis respubliko kaj forigis ĉiujn privilegiojn de la aristokratio. La habsburga familio eĉ ne rajtis loĝi en Aŭstrio.
Nur en 1961 kiam Otto Habsburg rezignis pri ĉiuj streboj reveni al trono, li ricevis permeson restadi en Aŭstrio. Nun tiu historia ĉapitro estas fermita. Otto Habsburg dum jardekoj elspezis sian energion por komuna Eŭropo. Li estis bonŝanca ke li ankoraŭ dum sia vivo povis vidi kiel tiu revo fariĝis realo. Li meritas sian lokon en la historio kiel granda Eŭropano.

/Sendinto /19.07.2011. Aloísio Sartorato/

## Societo de Tokajmontosubaj Kreantoj – Interreta Societo de Hungaraj Kreantoj

La Societo de Tokajmontosubaj Kreantoj sian 15-an jaran datrevenon kaj la Interreta Societo de la Hungaraj Kreantoj sian 10-an jaran datrevenon festis. La festo okazis en Szerencs, kie la malnovaj kaj novaj membroj kaj gastoj prezentis sin mallonge kaj oni konigis la plej elstarajn skribaĵojn. La feston partoprenis urbaj estroj de urbo Szerencs, gestudentoj de gimnazio Bocskay de Szerencs, kiuj prezentis festan programon kaj ankaŭ reprezentanoj de la similaj landaj kulturaj organizoj. La feston igis pli intima la festaj oratoraĵoj kaj eksonigado de hungaraj popolkantoj pere de „tárogató” – kurucepoka lignobeka fluto.
Ni deziras al ilia krea laboro /verkista, poeta, pentrista, artindustria, fotista, skulptista…../ pluajn multajn suksesojn.

Geedzoj-Pásztor

## Ŝercoj

**La anĝeloj kapablas flugi**

Iu knabeto demandas de sia patrinjo:

- Patrinjo, ĉu la anĝelinoj povas flugi?
- Kial vi demandas?
- Mi aŭdis, ke paĉjo nomis la purigistinon „mia anĝelino”.
- Jes, tiukaze ŝi flugos.

**Majstro-ĉasistoj**

Helikoptero portis du ĉasistojn en mezon de la arbaro por pafi urson.

- Morgaŭ mi revenos, - diris la piloto antaŭ la superflugo, - sed pafu nur unu urson,, ĉar ne estas permesate liveri per ĉi tiu helikoptero plurajn ursojn.

Sekvatage la helikoptero revenis, sed du ursoj mortintaj estis sur la arbara kampo.

- Mi diris, ke mi ne povas liveri du ursojn.

- Eĥ! Ni donis al la pasintjara piloto cent dolarojn kaj metis ambaŭ ursojn sur la helikopteron.

La piloto prenis la monon, metis sur la helikopteron la du ursojn, superflugis.Nature la helikoptero estis troŝarĝite kaj post dek minutoj falis. La du ĉasistoj transvivis la malfeliĉaĵon.

- Kie ni estas laŭ vi? – demandis unu el la „famaj majstro-ĉasistoj” konsciiĝante.

- Mi kredas, ke ni estas ne malproksime de tiu loko, kie ni falis pasintjare.

Esperantigis László Pásztor

## Hungara venko en Jordano

Matiaso Ruszák gajnis la reĝan ĉevalarkist-konkuron de Jordanio.
„Nur tiu povas gardi la heredaĵon de la praulоj, kiu vivas kune kun ĝi kaj konas ĝiajn leĝojn.” Je tiu ĉi instruo alvokas la atenton elstara rezulto de Matiaso Ruszák, 21 jarojn aĝa hungara junulo. Lia rezulto akiris rekonon al lia patrujo kaj internacie konfirmis, ke la ĉeval-arkpafado estas propraĵo de la hungararo.
La 9-10-an de junio de 2011 oni aranĝis la unuan mondan ĉevalarkist-konkuron en Jordanio. Je la invito de reĝo de Jordanio konkurantoj alvenis el 17 landoj por mezurigi sin kaj 36 personoj konkuris. El Hungario Miĥaelo Cozmei, majstro, kaj lia disĉiplo Matiaso Ruszák estis invititaj. La lasta reprezentis nian patrujon. La reĝo kaj liaj komisiitoj decidis baze de anticipa informiĝo kaj personaj interrilatoj, kiujn inviti por partopreni la mondkonkuron. La nomo de la lukto estis „Al faris” (kavaliro). La reĝo entreprenis ne nur patronadon, sed iuposttagmeze honorigis la okazintaĵon per persona ĉeesto. La konkurantoj ricevis reĝan, galantan, atenteman gastigadon, kiu karakterizas la orientajn landojn. La konkurantoj devis batali laŭ tri stiloj, kiuj determinis la konkur-specojn. Nature estis precizaj reguloj kaj poentumo.
1.HUNGARA STILO. Oni signis per tio la rekonatan gravecon de la hungaroj en ĉi tiu kampo. La konkurantoj devis arkpafi antaŭen, flanken, malantaŭen, galopante sur 90 metra kurejo dum tri kuroj.
2.KOREA STILO. Sur 90 metra kaj 150 metra kurejoj estis metitaj 1, 2 kaj 5 celdiskoj. La konkurantoj devis celi kaj pafi dum galopo laŭ ebleco plej rapide kaj plej precize.
3. La bazo de tiu stilo estis la ludo konata en Turkio, la t.n. „kabak”. Mezen de la 90 metra kurejo oni metis 9 metran stangon, kaj sur tiun diskoforman celon simboliganta kukurbon. La konkurantoj devis pafi de la galopanta ĉevalo. La dutaga konkuro postulis grandan persistemon, paciencon, memdisciplinon kaj koncentritecon de la partoprenantoj. Multe da cirkonstancoj ŝarĝis la konkurantojn. : 35-40 C-grada varmego, sufokiga sunbrilo, kaj forta vento. Ili konkuris ne sur la propra ĉevalo, sed ricevis fremdajn, ege rapidajn, arabdevenajn ĉevalojn.
Matiaso Ruszák estas membro de la lernejo „Vojo de arkisto” de Pomáz. Li ekzercas ekde jaroj en la Hungara Fortikaĵo kaj vintre kaj somere inter naturaj cirkonstancoj. Ĝis nun li partoprenis nur kelkajn enlandajn konkurojn. Lia nuna rezulto – ne sekretigate – surprizis ankaŭ la jordaniajn organizantojn, kiuj esperis enlandan venkon. En ĉiuj tri stiloj li atingis estradajn lokojn kaj fine oni elektis lin aklame kiel ĉampiono de la konkuro. Dum la festa vespermanĝo oni sidigis lin ĉe la tablo de la ĉefprinco /la frato de la reĝo/ kaj oni superŝutis lin per premioj. Oni diris, ke ankaŭ dum la sekva jaro oni atendas lin.
/http://addwebsitefree.com/blog/pozsonyi_csata/2011/06/24/magyar-orom-ruszak-matyas-nyerte-a-jordaniai-kiralyi-lovasijasz-versenyt//

## Speciala Fako en la Universitato de urbo Szeged

„Mi ĝoje informas vin ke la unua studjaro de la Speciala Fako: la Esperanta Kulturfakmanaĝero sukcese finiĝis en Szeged. Dudek du studentoj partoprenis la formadon konsistantan inter aliaj el kursoj pri movadhistorio, aranĝorganizado kaj esperanta lingvokurso. Fine de la studjaro la ekzameniĝintoj sukcese trapasis la mezgradan lingvoekzamenon pri Esperanto….”

Pri la listo:esp-en-hung / Ladányi Ildikó <ladanyi.ildiko@t-online.hu>

## „Antaŭen” 90-jaras

Esperantoseura Antaŭen r.y., Esperanto-societo Antaŭen estas fondita, registrita en la jaro 1921. Tiujare ĝi ricevis la nomon Tampereen Työväen Esperantoseura Antaŭen r.y., Laborista Esperantosocieto Antaŭen de Tampere. Jam antaŭ tio aperis kaj malaperis esperanto-grupoj unu post la alia.
Post la militoj en Tampere aktivis du esperanto-societoj, Antaŭen kaj Nesto, Tampereen yleinen esperanto-yhdistys, kiuj en praktiko havis la samajn funkciulojn. En la jaro 1972 la du societoj unuiĝis kaj prenis la nomon Tampereen Esperantoseura r.y., Esperantosocieto de Tampere. Poste en la 1980-aj jaroj la nomo mallongiĝis al Esperantoseura Antaŭen r.y. Instruado en Laborista Instituto komenciĝis en 1945 kaj daŭris ĝis printempo 2001.
En la 1950-aj kaj -60-aj jaroj oni prezentis Esperanton diversmaniere ekzemple en radio kaj en la nova TES-televido. Poste oni aranĝis ekspoziciojn kaj partoprenis en okazaĵoj en la urbo.
La plej grava informilo estis la klubgazeto Vekilo. Ĝi aperis de 1963 ĝis 2008. Ĉiuj membroj kaj en Finnlando funkciantaj esperantosocietoj aŭ grupoj ricevis ĝin. Vekilo estis sendita ankaŭ al la societoj en ĝemelurboj de Tampere.
En la jaro 1987 Antaŭen aranĝis la centjar-jubileon de Esperanto kaj pluraj Vintraj kaj Aŭtunaj Tagoj de EAF estas aranĝitaj ĉi tie. La plej grava komuna entrepreno de finnaj esperantistoj estis la Universala Kongreso en 1995 en Tampere-halo. Por memoro pri tiu granda okazo staras Esperantoarbo, speciala betulospeco de Pirkkala, en la apuda parko de Tampere-domo.
Neston, nian klubejon ni havigis post la kongreso (1997). Ĝi estas loko por diversaj kunvenoj kaj la libraro de pli ol 2000 titoloj, kiuj ĉefe estas hereditaj aŭ donacitaj.
En Nesto estas deĵorado ĉiulunde je la 16a –17a horo.

Sylvia Hämäläinen sekretario

## Vivovojo

Iam, de tempo al tempo hejmensaltas la pensoj de la en la foro vivanta sinjoro Teddy Maagan:
„En la hungara vilaĝo Ricse - kie naskiĝis ankaŭ mia patro en 1890, - naskiĝis ankaŭ Adolf Zukor - kiu elmigris Usonon en aĝo de 15 jaroj. Li fariĝis poste prezidento de la film-kompanio PARAMOUNT. Li vivis 103 jarojn. Mia patro vivis 91 jarojn kaj duonon - 1890-1982
Mi mem naskiĝis en oktobro 1921 dank' al sanigaj kosmaj ondoj mi resaniĝis - kaj konsidere mian aĝon mi bonege aktivas. Centre - la konstruaĵo ZSIDO EGYETEM -kie mi studis dum la jaroj 1935-1940 - ĝis la abiturientiĝo. Tiam ĝi portis la nomon Ferenc Jozsef Orszagos

Rabbikepzo Intezet. Eble mi jam menciis ke E-on mi eklegis en Bpeŝto en 1937 - kaj mi frekventis la klubejon ERA - Esperanto Rondo Amika, tie mi vidis la s-anojn Kalman Kalocsay, Julio Baghy kaj Lajos Totsche-Tárkony. Kiel mi eble jam menciis - mia plej agrabla vivperiodo estis tiuj 5 studjaroj en Budapeŝto, En 1940 mi abiturieniĝis - poste hejmenveturis al la loĝloko de miaj gepatroj , la apud-Danuba urbo - Orsova. Post la somera ferio en la loĝurbeto de miaj geptroj en la apud-Danuba Orsova - Rumanio - mi ne plu povis reveni por daŭrigi miajn studojn - ĉar la bukareŝta hungara konsulejo - kaŭze de antisemitismo - ne pretis doni al mi enir-vizon, Tiam mi decidis forlasi Rumanujon.
Pro la establiĝo de antisemita registaro en Rumanujo - mi decidis enmigri Pelestinon - mi forlasis Rumanion laŭleĝe sed eniris \Palestinon kontraŭleĝe - tial, la britoj malfermis min en tendarojn dum 17 monatoj. Mi alvenis perŝipe al la tiama Palestino - nun Israelo.
En la tago de mia liberiĝo en Aŭgusto 1942 mi alvenis al kibuco Maagan , kie mi vivas ankaŭ nun.
Mi loĝas en la Jordana Valo apud la lago Kinnereth aŭ Genezareth

**Jen, miaj artikoloj en Esperanto:**

Mi ofte rememoras pri mia kvinjara studado en Budpeŝto - 1935-1940. Ĝi estas la plej agrabla periodo en mia vivo
Cetere mia hungara baptonomo estis Tivadar - rumane Teodor. Miaj gepatroj turnis sin al mi per la karesnomo Tivi. Poste mi havis amikinon kiu preferis la nomon Teddy - kaj ĝis nun ĉiuj nomas min per tiu karesnomo. Jen artikoloj de sinjoro Teddy Löwenkopf:
http://reocities.com/Athens/cyprus/5318/8/artikoloj.html”

## ***Kiel mi fariĝis E-isto?***

En la somero de 1934, en aĝo de preskaŭ 13 jaroj, mi restadis en la nord-okcidenta Rumanuja urbo Satu-Mare. La filo de mia gastiganta familio altiris mian atenton al notlibro-formata broŝureto kun la rumanlingva titolo "Ŝlosilo de la lingvo Esperanto", en montra fenestro de libro-vendejo. Tio estis la t.n. Ĉefeĉ-ŝlosilo. Mia amiko aĉetis ĝin kontraŭ 5 leoj, kaj ni povis poste impresiĝi pri la praktika valoro de la proponata lingvo.

Tri jarojn poste, kiel jam triajara lernanto en la Rabena Seminario en Budapeŝto, Hungario, mi havis okazon denove aŭdi pri Esperanto. Tio okazis en kadro de t.n. memkleriga rondo. Unu el la lernantoj de pli alta klaso prelegis pri Esperanto. La ideo pri facila, belsona logika, internacia lingvo fascinis kaj kaptis nian junan fantazion. Tiam mi estis studinta plurajn lingvojn: la francan, germanan, latinan, malnovgrekan, ioman aramean gramatikon, kaj memkompreneble la hungaran, rumanan kaj hebrean lingvojn. La unua - gepatra, la alia ŝtata, la tria - nia nacia lingvo.

Baldaŭ poste formiĝis grupo de lernantoj, kiuj serioze ekinteresiĝis pri la ebleco ellerni tiun lingvon. Ni akiris per komuna mono la lernolibron de Medgyesi, kaj transdonante ĝin de mano al mano, ene de malmultaj semajnoj ni jam tiagrade posedis ĝin, ke ni decidiĝis ekviziti Esperantan klubon. Dume ni inter ni praktikadis E-on, tiamaniere, ke promenante surstrate, laŭkonsente dum difinita tempo ni parolis nur E-e. Laŭ mia scio, tiutempe [1937] funkciis en Budapeŝto du E-aj kluboj: unu "burĝa", kiun frekventis elstaraj samideanoj, tiutempe jam tutmonde konataj, kiel Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Ludoviko Tárkony k.a. La alia klubo estis laborista, ankaŭ ĝin ni vizitis unu aŭ du fojojn, ĝis iu bonvoleme avertis nin, ke ni

prefere detenu nin de amikaj rilatoj kun socialistaj samideanoj, ĉar la duon-faŝista reĝimo suspektas ilin per simpatio al komunismo, persekutita en la dummilita periodo . Mi persone havis duoblan kialon obei la konsilon - unue pro mia judeco, due pro mia fremda ŝtataneco, kaj malgraŭ mia simpatio al la laborista movado, mi ne emis endanĝerigi la daŭrigadon de miaj studoj.Kio altiris min persone al E-o estis ne nur la elstaraĵoj de la lingvo, sed ne malpli la amika, varma etoso kiun ni renkontis en la klubejo ERA [Esperanto-Rondo Amika]. Kompreneble, ni tuj prezentis nin kiel lernanto de Juda Teologia Seminario. Tiam mi konsciiĝis, ke esperantistoj apartenas al homoj de pli nobla speco. Tion pruvis inter alie Kalman Kalocsay, ne nur elstara esperantista verkisto kaj poeto, unu el la plej grandaj post Zamenhof, sed ankaŭ senriproĉa, vera humanisto. Dum la plej ŝtormaj tempoj, plej kruelaj persekutoj (1944), Kalocsay ne hezitis savi la vivon de mia kolego, samideano kaj bona amiko, vivanta ankaŭ nun en Hungarujo, je prezo de endanĝerigo de propra vivo. Savado de judoj kalkuliĝis gravega krimo, ilia murdo - patriota ago. La sagokrucistoj [hungaraj nazioj] senceremonie, surloke murdadis la kristanajn kaŝintojn kune kun la judaj kaŝitoj.

Jen ankaŭ pro tio nestas profunde en mia koro la amo al la Internacia Lingvo Esperanto. Jen pro kiel mi restos fidela al E-o ĝis mia lasta spiro.

Kun koraj salutoj
Teddy aŭ Teodoro - hebree Cvi”

Teddy Maagan el Israelo”
/La artikolojn de la 56-a p.ĝis la 62-a, kontrolis s-ro Josif Nagy Ro/

## En 2011, Nepalo estis loko de la Azia Esperanto-Kongreso

„Saluton avino! Post tre longa tempo mi ne respondis al vi. Hodiaŭ mi skribis iom pri la Esperanta Movado en Nepalo, kaj mi skribos pri orienta movado en alia letero.

**Esperanto Movado En Nepalo**

Esperanto- lingvo estis tre fama en aliaj fremdlandoj sed en Nepalo ne ekzistis E-movado ĝis 1956. Ekde 1957 E-movado komenciĝis en Nepalo. Tiam en Katmanduo S-ro Tibor Sekelj gvidis diversajn kursojn al Nepalanoj. Post gestudentoj fondis Katmanduan Esperanto-Societon. S-ro Tirtha Raj Onta estis ĝia prezidanto.
En 1991 UEA sendis S-ron Simo Milojevic al Nepalo por instrui Esperanton kaj li instruis dum ok monatoj. Tiam oni diris, ke ege fama poeto S-ro Laksmi Prasad Devkota kaj s-ro Bala Krisna Sama ankaŭ lernis Esperanton kun ĝojo. En 1980 gesinjoroj Morita kun grupo ankaŭ turismis en Nepalo kaj eksciis ke Esperanto movado ekzistas en Nepalo. En 1990, la UEA instruisto S-ro Joachim Werdin renkontis S-ron Mukunda Rag Pathik por helpon doni por instrui Esperanton. Preskaŭ 100 gestudentoj lernis Esperanton kun granda sukceso. Ekde 1990 S-ro Philip Pierce daŭre helpas la E-movadon.
La Nepala Esperano-Asocio (NEspA) fondiĝis la 3an de novembro 1990 kaj la Unua kongreso de NEspA okazis en Decembro de 1991. Tiam S-ro Masahiro Marc Ono kaj S-ro Philip Pierce multe helpis la esperantan movadon. En 1990 S-ro Pradeep kumar Paŭdel estis fondanta prezidanto kaj en 1991 S-ro Mukunda Raĝ Pathik estis la unua elektita prezidanto. En 1993 fondiĝis unu Klubo Esperantista en Patan, kun prezidanto S-ro Razen Manandhar. Tiel en 2002 fondiĝis Orienta Nepala Esperanto Societo kun prezidanto S-ro Satendra Nath Bandhupadhjaja kaj vicprezidanto Shree Prasad Pokharel kaj Ĝenerala sekretario S-ro Chola Nath Pokharel. La fondinta prezidanto de Nepala Esperanta Junulara Organizo estis S-ro

Dhurba Pokharel kaj S-ro Prakas Bhattarai elektiĝis en Unua kongreso de NEJO. En ĉiu sabato geesperantistoj renkontiĝas en oficejo de NEspA ek de 11:00 ĝis 13:00 kaj ankaŭ gvidas diversajn kursojn kaj la estrara kunveno de NEspA okazas en ĉiu unua Sabato. Ekde 1995 NEspA aranĝas Internacian Himalajan Renkontiĝon en Nepalo ĉiu dua jare.

Dankon, ĝis: via nepino Alinka POKHREL pokhrel_alinka2006@yahoo.co.in

## Karstaj Tagoj enTriesto – Italio

**Renkontiĝo: 2 junio – 5 junio 2011**

Jaŭdon la 2an de junio: Ekde la 10a horo matene: alveno de partoprenantoj kaj enhoteliĝo. Posttagmeze: ĉiĉeronado tra la urbo; komuna vespermanĝo ĉe Triesta Esperanto-Asocio; prezentado de bildoj pri Triesto kaj ĉirkaŭaĵoj. Vendredon la 3an de junio: Per aŭtobuseto al belvidejo de San Lorenzo; promenado laŭ la fervoja vojo; Bottazzo kaj laŭ Valo Rozandra, karsta mirindaĵo; halto ĉe la plej malalta rifuĝejo Premuda. Sabaton la 4an de junio: Promenado laŭ la pado de Naturo ĝis Santa Croce kaj la pado de Salvio, de Santa Croce al Aurisina. Dimanĉon la 5an de junio: sekvante la spurojn de dinosaŭroj: al Villaggio del Pescatore (Fiŝkaptista Vilaĝo), vizito de Paleontologia ejo, promenado laŭ pado Rilke; tagmanĝo kaj foriro. Okaze de malbona vetero, povos okazi ŝanĝoj en la programo. Eblas alveni tago(j)n pli frue aŭ plilongigi sian restadon en Triesto, post interkonsento kun organizantoj. / BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, **Redaktanto:** Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com **Sidejo**: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21/

## Leterkesto

**La unua indonezia E-bulteno ĉi-jarmile**

„Kun multe da ĝojo, post baraktado kontraŭ precipe burokrateco de banko kaj ambasado, ni povas sciigi ke Ilia Sumilfia Sondang Dewi kaj Endang Sabrina Sitompul ricevis Schengen-vizon kaj aĉetis flugbileton. Do, nenio plu malhelpas ilian venon al Eŭropo por partopreni plurajn E-aranĝojn. Ili alvenos la 12an de julio en Eŭropon, kaj la 17an de julio en Kopenhagon. Samtempe, post baraktado kontraŭ la tempopremo, ni povas prezenti al vi la unuan indonezian E-bultenon post 20 jaroj. Estas en ĝi tekstoj en du lingvoj, sed estas sufiĉe da teksto en Esperanto por ke vi havu ideon pri la 'nova' movado en Indonezio.

Ni prezentas ĝin al vi por danki vin pro via subteno al la indonezia movado, ĉu pro subteno aŭ helpo por la instruvojaĝoj en 2009 kaj 2010, ĉu pro la helpo igi plurajn indoneziajn membroj de UEA pere de Fondaĵo Canuto, ĉu pro subteno al la venigo de Ilia kaj Sabrina al Eŭropo. Ni certas ke ilia veno multe helpos al la indonezia movado kaj vere kreskigos kaj aktivigos ĝin.

La bulteno troviĝas en https://sites.google.com/site/esperantoenindonezio/bulteno. Aliloke en tiu retejo estas troveblaj aliaj informoj pri la movado en Indonezio."

Heidi Goes-Germain Pirlot

**SUS 32 de AIS San-Marino, septembro 2011**

SUS 32, la 32-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino, okazos inter la 24-a de septembro kaj la 1-a de oktobro 2011 en la rumania distrikta ĉefurbo Sibio (Sibiu), kiu en 2007 estis kultura ĉefurbo de Eŭropo.

*Legeblas ĉe* < http://www.ais-sanmarino.org/ > */Informo de: gepir.apro@pandora*

**Tutmonda TV kaj Radio en Esperanto**

Alklaku kaj vizitu la ttt-ejon "Tutmonda TV kaj Radiio en Esperanto". Vi bone surpriziĝos!
*www.**esperanto**-tv.com/radio*
*Informis: Aloísio Sartorato Rio, Brazilo*

**Reta PIV**

„Alklaku sube kaj legu pli detale en Libera Folio la ĉi-supran novaĵon:
**http://www.liberafolio.org/2011/la-apero-de-reta-piv-nun-estas-certa**

Aloísio Sartorato"

**Nova prezidanto de Eŭropa Parlamento**

Fariĝu ŝatanto de Jerzy Buzek - prezidanto de la Eŭropa Parlamento - kaj poste provu lin ĝentile atentigi pri la ebla rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. Vi povas enskribi mesaĝojn sur lian komunuman paĝon: http://www.facebook.com/JerzyBuzek
Nepre aliĝu ankaŭ al la paĝo: http://www.facebook.com/PolskaPrezydencja2011

d-ro Ludoviko Molnár

# UK Kopenhago, 2011

„**Himno de Esperanto: La Espero, kariljono de Helligaandskirken**

En Kopenhago, dum la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, ni renkontiĝis por aŭskulti la koncerton de la kariljonisto Jo Haazen el Belgio. Marde, la 26-an de julio 2011, Helligaandskirken, København.
http://www.ipernity.com/doc/biciklanto/11102160/
Registraĵo publikigita kun permeso de s-ro Jo Haazen - Aloísio Sartorato

**La 96a Universala Kongreso de Esperanto komenciĝis** hodiaŭ (23.07.2011) en Kopenhago, Danio, kun 1413 partoprenantoj el 66 landoj. La unua okazis en 1905 en Francio, en Bulonjo ĉe Maro, kun ĉeesto de la iniciatinto de Esperanto, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. En tiu ĉi kongreso partoprenas lia nepo Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, kiu vivas en la pariza regiono. Francio estas la plej reprezentita lando kun 174 partoprenantoj, spite de malfavora registara sinteno, dum Ĉinio, kie ne estas registaraj malhelpoj kontraŭ Esperanto, percepteble progresas de jaro al jaro…
https://groups.google.com/forum/#!topic/twitter_agado/JQgQzom00pg

## Rezultoj de Belarta Konkurso de UEA 2011

**POEZIO**

Unua premio : Jorge Camacho Cordon, Hispanio pro "Sezonoj"
Dua premio: Ulrich Becker, Usono pro "Adiaua festo
Tria premio: Jorge Camacho Cordon pro "Lokoj"
Honora mencio: Aleksandro Mitin, Rusio pro "Vivhorloĝo"
Partoprenis 43 verkoj de 18 aŭtoroj el 14 landoj
*Juĝkomisiono: Carmel Mallia (Malto), Anja Karkiainen (Finnlando), Gerrit Berveling (Nederlando)*

**PROZO**

Unua premio: ne aljuĝita
Dua premio: Sten Johansson, Svedio pro "Brokante"
Tria premio: Sten Johansson, Svedio pro "Nova amiko de Sinjoro Brunner"
Honora mencio: Ulrich Becker, Usono pro "Malapero de knabo"
Partoprenis 20 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj
*Juĝkomisiono: Donald Broadribb (Aŭstralio), Jhak Le Puil (Francio), Syozi Keiko (Japanio)*

**ESEO**
**Unua premio**: Davide Astori, Italio pro ”La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado”
**Dua premio**: Jan Werner, Ĉeĥujo pro “Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado”
**Tria premio**: Filippo Franceschi, Italio pro “Post legado de ‘La mava lingvo’
**Honora mencio**: Adrienne Pásztor, Hungario pro “Tutmondaj defioj de la klimatŝanĝiĝo”
Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 3 landoj
*Juĝkomisiono: Detlev Blanke (Germanio), Gotoo Histoshi (Japanio), Giancarlo Fighiera (Italio)*
**TEATRO**
Unua premio: ne aljuĝita
Dua premio: ne aljuĝita
Tria premio: Doron Modan, Israelo pro “Justa juĝo”
Honora mencio: Joao José Mendes Quiterno dos Santos, Portugalio pro “Autodafeo”
Honora mencio: Georgo Handzlik, Pollando pro “Kompleta (preskau) historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto”
Partoprenis 8 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj
*Juĝkomisiono: Wera Blanke (Germanio), Paul Gubbins (Britio), Giuliano Turone (Italio)*
**KANTO**
Unua premio: ne aljuĝita
Dua premio: Roger Borges, muziko kaj Eric Languillat, teksto, Francio, pro “Tatua Papili’”
Tria premio ne aljuĝita
Partoprenis: 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj
*Juĝkomisiono: Alan Bishop (Aŭstralio), Gianfranco Molle (Italio), Flavio Fonseca (Brazilo)*
**FILMO**
Unua premio: Roman Dobrzynski, Pollando pro “Japana pritempo – Oomoto 2009”
Dua premio: ne aljuĝita
Tria premio: ne aljuĝita
Partoprenis: 2 verkoj de 2 aŭtoroj e 2 landoj
*Juĝkomisiono: Ghuzal Badamshina (Usono), Taesok Choe (Litovio), Floreal Gabalda (Francio)*
**INFANLIBRO DE LA JARO**
“Avo Paŭlo” de eldonejo Margritt Vollertsen, Germanio Sabine Hauge
Partoprenis 5 verkoj de 5 eldonejoj el 5 landoj
*Juĝkomisiono: Jouko Lindstedt (Finnlando), James Rezende Piton (Brazilo), Kitagawa Hisasi (Japanio)*

Laŭ Informoj de s-inoj Michela Lipari (Italujo) kaj Betty Chatterjee (Danio)



**Sinjoro d-ro prof. HumphreyTonkin prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA salutas la ĉeestantojn de la premiotransdona festeno.**




**La premiito laŭtlegas iom el sia verko, kaj dume sur la ekrano aperas la plej bela parto de la premiita verko.**



**La bildojn preparis kaj sendis Betty Chatterjee el Kopenhago, Danio**

## REZOLUCIO DE LA 96-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La partoprenantoj en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj al Kopenhago el 66 landoj, komune dialogis pri la iniciato kiun UN lanĉis per la proklamo de Internacia Jaro de la Junularo, *efektivigis* multvidpunktan diskutadon pri tiu temo, en etoso de interkomprenemo kaj efika komunikado, *ĉerpinte* el niaj unuopaj kaj kolektivaj spertoj kiel anoj de diversaj socioj, aĝogrupoj, etnoj, seksoj, mondvidpunktoj, politikaj sintenoj kaj religiaj konvinkoj, *agnoskinte* la kontribuojn de la junularo al la socio kaj la neceson malfermi ŝancojn por ĝia partopreno en la kolektivaj decidoprocezoj, por taŭge alfronti la diversajn defiojn kaj ŝancojn de la nuna realo - sociekonomiajn, ekologiajn, politikajn, teknologiajn ktp - cele al la estonteco de la homaro kaj la planedo, *konstatinte* ke tra la epokoj kaj kulturoj, la diversaj generacioj rilatis inter si laŭ variaj modeloj kaj strategioj, kun foja estiĝo de aparta junulara kulturo, kaj ke en la Esperanto-movado mem tio esprimiĝis ekz. per la efike avangarda rolo plenumita de ties junulara branĉo en apartaj historiaj turnopunktoj.
*Rekomendas*, ke la unuopaj organizaj instancoj kaj sociaj medioj de la Esperantaj movado kaj komunumo aktive strebu al la kreado de taŭgaj kondiĉoj por kontakto, alproksimiĝo kaj kunlaborado inter junuloj kaj aliaĝuloj, ke la anoj de la malsimilaj aĝogrupoj en Esperantujo iĝu pli konsciaj pri la potencialo kiun por intergeneracie kontentigaj rilatoj liveras la esperantisma ideo mem de reciproka respekto kaj ambaŭdirekta bona volo,

*alvokas*
al UEA, TEJO kaj iliaj respektivaj landaj organizoj pliproksimigi tempe kaj geografie siajn kongresojn, same internaciajn kiel landajn kaj regionajn, per kunordigita decidado, al konkretaj paŝoj ĉiunivele por kunagigi esperantistojn rete kaj eksterrete agantajn, same por enmovadigi perretajn lernintojn de la lingvo, kiel por helpi la tradician movadon adaptiĝi al la nuna epoko.

*Kopenhago, 30 julio 2011*

## LA KOPENHAGA UK FERMITA, HANOJO KAJ REJKJAVIKO ATENDAS

Sabaton, la 30-an de julio, finiĝis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago per la Solena Fermo, kiun gvidis la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak faris resuman raporton pri la laboraj, klerigaj kaj kulturaj programeroj, kiuj disvolviĝis dum la kongresa semajno. D-ro José Antonio Vergara, kiu reĝisoris la traktadon de la kongresa temo, ligita al la Internacia Jaro de Junularo, legis la kongresan rezolucion, en kiu kristaliĝis la konkludoj el tiu traktado.

Estraranino Claude Nourmont anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj kaj Oratora Konkurso. Estrarano Amri Wandel disdonis diplomojn pri elstara agado al ok meritplenaj movadanoj kaj diplomojn pri elstara arta agado al kvar kulturaj agantoj. Estraranino Maritza Gutiérrez anoncis la ricevantojn de la subvencio Cigno kaj transdonis la "esperantistan pacpremion", Premion Deguĉi, al s-ro HORI Jasuo el Japanio. Estraranino Loes Demmendaal transdonis diplomojn pri 50-jara kaj 40-jara seninterrompa membreco en UEA.

Post la ferma festparolado de prezidanto Dasgupta la partoprenantoj de la Internacia Infana Kongreseto ĝojigis la publikon per du kantoj. Poste la LKK-prezidantino Ileana Schroeder kaj Konstanta Kongresa Sekretario Clay Maglahães invitis sur la podion la LKK-anojn kaj la helpantojn, kiuj ricevis rozon kaj fortan aplaŭdon de la dankema kaj evidente tre kontenta kongresanaro.
Fine sekvis la transdono de la kongresa flago, kiun el la manoj de s-ino Schroeder akceptis la prezidanto de LKK de la 97-a UK, s-ro Nguyen Van Loi, kiu kore bonvenigis la kongresanojn post unu jaro al Hanojo. Pli frue, Barbara Pietrzak anoncis la decidon de la Estraro de UEA, ke la 98-a UK en 2013 okazos en Rejkjaviko, 36 jarojn post la antaŭa UK en la islanda ĉefurbo. Post la komuna kantado de "La Espero" sub la gvido de la Internacia Koruso kaj ĝia estro Alan Bishop la prezidanto de UEA deklaris la 96-an UK fermita.

/Laŭ informoj de http://www.uea.org/kongresoj/uk_2011.html /Vikinga Voĉo N-ro 6/

/Korektis s-ino Jindriŝka Drahotová Ĉeĥujo/

## Gratulo

Ni elkore gratulas ĉiun distingiton, premiiton, kaj la libro-verkistojn pro iliaj gravaj libroj prezentitaj dum la UK.

Esperanto Amika-Rondo „Király Lajos”

# NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

*Tel.: + 36 70 206 1739*
*Tel.: + 36 70 570 8895*
*Tel.: +36 46 738 982*

Retpoŝto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu
Retpaĝo: http://kiralylajos.uw.hu